


# MONATO

80.- b.fr.

1/80

internacia magazino sendependa 15 januaro 1980





## La Verko de la Jaro 1979


# La Granda Kaldrono

de John Francis. 692 paĝoj. 630 bfr.

Ni povas dankeme gratuli Torben Kehlet kaj Stafeto, ke ili ĝin publikigis en plaĉe impona volumo.

Pro la valoro de la enhavo kaj la alta nivelo de la formo, mi opinias, ke tiu ĉi romano superas *Metropoliteno*, *Vojaĝo al Kazohinio*, *Kiel akvo de l'rivero*, kaj mi ŝatus dividi kun multaj esperantistoj ĉion, kion ĝi donis al mi dum kaj post la legado.

(esperanto)



Tiu ĉi verko estas nepre epokfara.

Esperable la libro furore disvendiĝos, ĉar tion ĝi meritas.

(Brita Esperantisto)

La lingvouzo estas vere rimarkinda. La aŭtoro neniam elektas facilan vorton; li ĉiam sukcesas trovi la plej efikan.

(Literatura Foiro)

LA GRANDA KALDRONO estas romano, laŭ esperantistaj kriterioj grandskala, kaj certe unu el niaj plej maturaj prozaĵoj.

(Dialogo)

Krilov, *Elektitaj Fabloj*. 336 paĝoj. 315 bfr.

Ja vere dankinda estas Stafeto pro la publikigo de tiu belaĵo. Rublov aplikis tre larĝe en ĉiuj 182 fabloj la sonritman strukturon; t.e. parencaj kaj identaj sonoj (konsonantoj) troviĝas ne nur en rimoj, sed ankaŭ interne de verslinioj; ili harmonie kunigas la tekston je unu poezia tuteco.

La eldonisto zorgis, kiel kutime, pri arta kaj belaspekta prezento.

(Sennaciulo)



Henrik IBSEN: *Brand*. 320 p. 315 bfr.

La traduko, fare de Erling Anker Haugen (antaŭa tradukinto de *Peer Gynt*, 1951) estas grandfaro.

(Dialogo)

Traduki pli ol kvin versojn estas longega lukto inter formo kaj enhavo. Erling Anker Haugen elegante solvis tiun problemon. La lingvo fluas glate, neologismoj kaj poeziaj formoj aperas laŭdinde malofte. Haugen ŝpareme uzas apostrofojn. Jen kaj jen li transiras la gramatikajn limojn aŭ per la ritmo akcentas neantaŭlastan silabon, sed poetan liberecon ja certe ĝuas ankaŭ poezia tradukanto.

(esperanto)



MENDU ĉe via libroservo, ĉe la libroservo de UEA aŭ rekte ĉe la eldonejo TK STAFETO Heideweg 20 B-2120 Schoten pagante la prezon de la mendata(j) verko(j) plus 10 % da sendkostoj al unu el niaj kontoj.




Estimataj legantoj,

en tiu ĉi unua numero de nia magazino vi trovas ankaŭ recenzojn pri libro, per kiu Teo Jung priskribas ne nur multajn interesajn jardekojn de sia vivo, sed kompreneble ankaŭ estiĝon kaj evoluon de unika gazeto: Heroldo de Esperanto. Nu, estas hazardo ke ĉi tiu recenzo aperas en ĝuste nun naskita alia unika periodaĵo. Tamen oni ne povas kompari unu kun la alia. Tro diferencaj estas historiaj, ideaj, teknikaj kaj movadaj cirkonstancoj dum la respektivaj naskiĝoj.

Sed ja estas plia kaj plej grava diferenco: La gazeto fondita de Teo Jung ankaŭ hodiaŭ havas en sia titolo la vorton Esperanto. Ĝin vi trovos en ĉi tiu magazino nur tre malofte. Malgraŭ tio ja estas fakto ke MONATO aperas ekskluzive en Esperanto, kun artikoloj kaj kontribuaĵoj verkitaj originale en la internacia lingvo. Aliflanke tio signalas, kian karakteron havas MONATO. Simple dirite, ĝi estas tute ordinara magazino, kiu turnas sin al legantoj de ĉiuj landoj, ĉiuj medioj kaj ĉiuj aĝoj, do kvazaŭ al la tuta familio.

En tio ĝi do similas al multaj nacilingvaj magazinoj. Ĉu do ne superflua revuo? Nur por pruvi ke tian magazinon oni povas eldoni ankaŭ en Esperanto, ni certe ne faras ĉi tiun aŭdacan paŝon. Karakterizo de MONATO estas ke raportas, informas kaj kontribuas en ĝi aŭtoroj el la koncernaj landoj, do indiĝenoj, ne iuj tien senditaj fremdlandaj ĵurnalistoj. En tio MONATO funde diferencas de kaj antaŭas al siaj grandaj nacilingvaj fratoj. Krome ni ne forgesu ke tiaj magazinoj aperas nur en kelkaj "grandaj" naciaj lingvoj, dum MONATO estas legebla ankaŭ en "malgrandaj" nacioj.

Multaj el vi scias ke origine ni planis eldoni semajnan magazinon. Neniu pli multe bedaŭras ol ni ke ne povas nun realiĝi ĉi tiu plano. Longe ni hezitis anstataŭe aperigi monatan magazinon. Estis vi, estimataj legantoj, kiuj konvinkis nin. Jen do MONATO, infano komuna de ni (eldonantoj) kaj vi (legantoj). Prosperu nia infano!



Sincere via  
Stefan Maul

*Stefan Maul*

ĉefartikoloj

**Religio kun aŭ kontraŭ Politiko** 8-12

Post la islama revolucio en Irano: Kiel interrilatas la sferoj politiko kaj religio en aliaj landoj, kiel unu influas la alian?

**Hardado de la korpo: fonto de sano** 14-15

Praktikaj konsiloj, laŭ kiuj vi mem povas apliki akvajn procedojn

---

OPINIOJ DE L' MONATO 13

---

RAPORTOJ DE L' MONATO 25-35

---

SERIO DE L' MONATO

**De kolonio al sendependa nacio** 36-37

Travivaĵoj de Edward Symoens en Belga Kongo (Zairio) kaj Ruando de 1947 ĝis 1975

---

rubrikoj

NOTICOJ 4-5

LETEROJ 6-7

HOBIO: ornamaĵoj el naturproduktoj 19

DOKUMENTO DE L' MONATO 30

KUIR-RECEPTO: cepa supo 33

TURISMO: Walser-Valo (Aŭstrio) 38-39

---

specialaĵoj

Paĝo de infanoj 22

Paĝo de junularo: Hare Kriŝna 24

---

distraĵoj / konkursoj

Memoroj — por grizuloj 15

NOVELO: Mallonga vojaĝo al Brazilo 17-19

krucenigmo 20-21

La aventuroj de Grafo Logo kaj Kukumeto 23

Kolumno de legantoj 29

Kiu estas? — portretenigmo 35

---

**MONATO – internacia magazino sendependa**

**– por politiko, ekonomio kaj kulturo**

**– monata revuo en la internacia lingvo Esperanto**

Aperas ĉiun 15an de monato (11kajeroj jare) — prezo 80 Bfr — jarabono 800 Bfr aŭ egalvaloro (inkluzive sendkostoj) — duona jarabono 400 Bfr — respondeca eldonisto (verantwoordelijke uitgever): Torben Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio — ĉefredaktoro: Stefan Maul, Holbeinstr. 11, D-7970 Leutkirch, FR Germanio — eldonejo: TK/STAFETO p.v.b.a., Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio, telefono (031) 514636, poŝtĉekkonto Bruselo n-ro 000-0422856-33 — valida anonctarifo: n-ro 1 — kompostejoj: Grafika Centro de UEA, Antwerpen; Intelesko, Chapecó, Brazilo — presita de la eldonejo.

Kun la ĉefredaktoro korespondu nur pri redakciaj aferoj, kun la eldonejo nur pri administraj aferoj. Por adresŝanĝoj bonvolu reŝendi la ne plu validan adreslipon kune kun la nova adreso.

**Abonilon por MONATO vi trovas sur paĝo 5.**

**Pliajn informojn pri MONATO vi povas legi sur paĝo 40.**



De **Abudabio** ... tra Fiĉio, Novfundlando, Sanmarino ... ĝis **Zanzibaro** el ĉiuj kvin kontinentoj mankas en mia kolekto tre multaj **naciaj himnoj sur diskoj**. Kiuj konas, povus sendi al mi mankantajn himnodiskojn? Sciigojn de ĉie atendas Georgo Csüllög, Pf. 189, H-1502 Budapest, Hungario

Kiuj deziras kunlabori kaj gajni unu lokon en la **Esp.-Komunumo Paradiza Hejmo?** Ni deziras kor. kun mekanikdesegnistoj, spertuloj de plasto, valizfabrikistoj, studentoj aŭ spertuloj de lino. Informoj ĉe: Esp.-Klubo de Inventistoj, Universalaj Geviroj, Box 607, Saipan, Mariana Islands 96950, Usono

**Vegetaranoj**, naturistoj, vivreformistoj, praktikantoj de jogo — ĉiuj, kiuj serĉas la vojon de sana, laŭnatura vivmaniero — estas organizitaj en la **Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio**, fondita en 1908 pere de L.N. Tolstoj, Zamenhof, Ladevéze, kaj legas la bultenon **Esperantista Vegetarano**, fondita en 1914. Kotizo, abono ne ekzistas, nur libervolaj mondonacoj kiam ajn, tio sufiĉas por membriĝo libervola. Aliĝu resp. informojn petu de: Ernesto Vána, CS-962 71 Dudince, Slovakio.

#### HOMO TERANA KION VI BEZONAS

por aboligo de LIMOJ enkoraj kaj surteraj estas KONSCIENCO PRI HOMAJ RAJTOJ cele ekstarigi por viaj propraj rajtoj kaj protekti la rajtojn de aliaj.

KION VI BEZONAS estas ILO por realigo kaj aplikado de HOMAJ RAJTOJ.

Sendu tuj poŝtkarton por ricevi la kompletan tekston de la UNIVERSALA DEKLARADO pri HOMAJ RAJTOJ en Esperanto kaj alilingve laŭ peto, kun listo de ILOJ, i.a. la MONDPASPORTO seplingva inkl. Esperanto.

MONDA SERVO AUTORITATO  
Distrikto 1: PK 1345, CH-4002 Basel

Distrikto 2: London WCV 6XXX

Distrikto 3: (440) 529, 14 StrNW, Washington DK 20045

Distrikto 5: PK 20178, IL-61200 Tel-Aviv-Jaffa

#### Medicina terminaro

27paĝa Esperanta Medicina Terminaro de d-ro Jozefo Hradil aperis ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio (Jilská 10, CS-110 00 Prago 1). Ĝi kostas 4 nedl. guld. aŭ egalvaloro en internaciaj respondokuponoj.

#### Aŭtomata piano

Ankaŭ sen la manoj de partnero oni nun povas ludi pianon kvarmane: Nova aŭtomato (kosto ĉ. 6 000 germanaj markoj) ebligas akompanon de plej famaj pianistoj per kasedo. Per elektronikaj impulsoj estas movataj klavoj kaj pedaloj.

#### Armila superlativo

Tute nerimarkite Francio fariĝis plej granda eksportanto de armiloj. Laŭ freŝa statistiko ĝi eksportas kompare al la loĝantaro plej multajn armilojn. Ĉirkaŭ 280 000 francoj vivtenas sin per ĉi tiu negoco, kiu portas al la lando ĉiujare ok miliardojn da dolaroj. Ĉefe kreskas la merkato por armiloj en la tria mondo, kiun regas ĝis nun Usono per 47 procentoj;

duan lokon okupas Sovetunio per 27 procentoj. Sed Francio konkureris jam 11 procentojn ankaŭ de ĉi tiu armil-merkato.

#### Lakto-manko

En Brazilo mortas ĉiujare pli ol 4 milionoj da infanoj pro manko de lakto, dum miliardo da litroj da lakto estas forĵetataj aŭ donataj al porkoj, ĉar mankas — konsumantoj. La lakto-industrio de la lando ne kapablas liveri lakton sen malfreŝiĝo en la centrojn de la grandaj urboj; tio estus tro multekosta kaj do seninteresa por konsumantoj. Oni konsumas jare 96 litrojn da lakto, sed necesus 260 litroj por infano kaj 1 651 litroj por plenkreskulo.

#### Scala kun reklamo

Nekredeble por oper-amikoj: La mondfama operejo de Milano "Scala" estu savata de bankrotiĝo per reklamado por fromaĝo, parfumo aŭ lavmaŝinoj. La deficiito de la operejo lastjare atingis la sumon de kvin miliardoj da liroj.



*Elektroŝoko savas la vivon de ĉi tiu paciento. Kortremado pro neregula kuntiriĝo de la unuopaj muskolfibrooj estas tre danĝera. "Defibrilacio" nomiĝas la tujkuracado per ĉi tiu aparato, kiun oni nun povas havi ankaŭ en malgranda formato, tiel ke ĝi estas portebla, do aparte taŭga por urĝegaj kazoj.*



Ĉi tiuj timigaj instrumentoj ne estas novaj pafiloj, male: Per ili oni traserĉas dum la Olimpiaj Ludoj en Lake Placid [lejk ple-sid] la teritorion por trovi kaŝitajn bomb-ojn. Oni volas eviti masakron similan al tiu en Munkeno dum la tiamaj ludoj.



### TV el la universo

Jam ekde 1985 verŝajne televidaj programoj venos ĉefe el la universo, ĉar ne plu sufiĉas la kapacitoj surteraj. Oni uzos satelitojn 36 000 km super la ekvatoro; diversaj ŝtatogrupoj havos komunajn satelitojn. Unu grupo estos ekzemple Aŭstrio, FRGermanio, Italio kaj Svislando; alia grupo estos la skandinaviaj landoj kaj tria la orienteŭropaj ŝtatoj. La kvalito de la ricevo estos multe pli bona. La sendiloj surteraj estonte povos esti uzataj pli multe por regionaj programoj.

### Parta laboro

Depost enkonduko de la sveda partopensiono en 1976 jam 18,5 % uzis ĉi tiun eblecon. Tiuj 37 000 personoj en aĝoj de 60 ĝis 64 jaroj ordinare reduktis sian

labortempon je duono. Ili laboras ekzemple nur kelkajn tagojn dum semajno, aŭ dum kvin tagoj malpli multajn horojn, aŭ nur ĉiun duan semajnon komplete.

### Asuan-digo: misplanita

La 5 km longa kaj 111 m alta digo de Asuan, kiu retenas en lago de giganta grandeco la akvon de Nilo, estas giganta misfaraĵo. Ĝi efikas gravegan ŝanĝon de la natura reguliĝo de la Nilvalo. Tion rezultis esploroj de egipta profesoro F. N. Ibrahim de la universitato de Hamburgo. Ekzemple mankas ĉiujare ĉ. 100 milionoj da tunoj da fekunda ŝlimo, kiujn antaŭe alportis Nilo; sekve la agrikulturo grave suferas. En Etiopio la grundo saliĝas, ĉar ne plu forlavas Nilo — kiel antaŭe — la salon.

### Nafto en sablo

La plej granda rezervo de nafto troviĝas en Venezuelo: 300 miliardoj da tunoj, kio estas proksimume tiom, kiom havas ĉiuj aliaj naftoŝtatoj kune. Sed ĉi tiu nafto estas kvazaŭ ensabla kaj tial tre malfluida. Por ekspluati ĝin oni devas aŭ per varmega vaporo subtere fluidigi ĝin aŭ kemie "el-lavi". Spertojn pri malfluida nafto havas okcidentgermana firmo, kiu en norda Germanio sukcese vapor-fluidigis nafton. Oni jam komencis ellabori projekton. Kunlaboras apud germanaj ankaŭ japanaj firmoj kun Venezuelo.

### Lingvo-gvidilo

Aperis lingvo-gvidilo Esperanto-hindia. Interesuloj povas havi ĝin kontraŭ sendo de 2 internaciaj respondkuponoj ĉe Walter Kobelt, Landquarstr. 81b, CH-9320 Arbon, Svislando.

### Radio Pekino ĉiutage

Jam de la 30a de oktobro Radio Pekino elsendas en Esperanto ĉiutage duonan horon. Al Eŭropo dum GMT 20 ĝis 20.30 h je ondoj 43 kaj 31 (6860 resp. 9380 kHz), al Japanio kaj Koreio je Pekina Tempo 19 ĝis 19.30 h je ondoj 41 kaj 30 (7315 resp. 9860 kHz) kaj al Sudorienta Azio je Pekina Tempo 21 ĝis 21.30 h je ondoj 25 kaj 19 (11685 resp. 15145 kHz).

**Por aboni aŭ donaci abonon de MONATO, uzu ĉi-suban slipon. Se vi ne volas eltondi, skribu poŝtkarton kun la samaj indikoj. Kiel vi povas pagi, bonvolu legi sur la lasta paĝo.**

Al eldonejo TK/STAFETO, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio

Jes, ankaŭ mi volas legi la revuon MONATO.

Mi donacas jarabonon al

Mi samtempe pagas al .....

Nomo: \_\_\_\_\_

Nomo: \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_

Skribu maŝine aŭ preslitere!



**Marksismo — Afriko**

(pri artikolo "Terorismo mondvas-  
ta" en SEMAJNO n-ro 0)

Por ni marksistoj (mi estas mult-  
jara marksisto kaj membro de Ko-  
munista Partio de Jugoslavio) estas ŝokantaj kaj ofendaj la fra-  
zoj: "Taŭgan klarigon por tio live-  
ras primitiva militema marksismo,  
ofte la vaga fono de la social-  
revolucia terorismo" kaj "Ĉi tiu  
primitiva marksismo longan temp-  
on helpis ankaŭ la teroristojn ag-  
antaj tutmonde. Gadafi, ŝtatestro  
de Libio, mem stranga 'marksisto'  
akceptas amike teroristojn." Ne-  
nion ŝanĝas la frazo: "Inverse  
tamen, tute ne estas vere, ke  
marksisma pensmaniero kondu-  
kas al terorismo" ĉar restis la  
aserto ke marksismo estas primi-  
tiva kaj militema. Aŭ estas eble du  
marksismoj: unu tia kaj alia evolu-  
inta pacema? Aŭ mi miskompren-  
is la tutan aferon, tiam mi par-

donpetas, sed ankaŭ multegaj  
aliaj miskomprenos. — En la arti-  
kolo "Afriko perturbata" la kaŭ-  
zojn de konfliktoj oni atribuas al  
malalta kulturnivelo de la indiĝe-  
noj, evitante mencii la verajn kaŭ-  
zojn: la rasismajn persekutojn kaj  
la subteran agadon de iuj neafri-  
kaj grandpotencoj, kiuj donas  
multan monon al "ribeluloj" por  
krei militon, ĉar al iu ili ja devas  
vendi la grandegan stokon de  
malmoderniĝintaj armiloj kaj trovi  
pretekston por instali proprajn ba-  
zojn sur tiuj teritorioj, komprene-  
ble "por protekti la landon kontraŭ  
minacoj". Tiom da fojoj vi men-  
cias Idi Amin, sed Jan Smith kaj la  
Sudafrikan Union tute ne.

Antonije Sekelj, Jugoslavio

**Finfine**

Mi gratulas. Finfine oni ne plu  
legos en Esperanto nur por uzi kaj  
lerni la lingvon, finfine oni ne plu  
abonos nur por subtenemo!

"Terorismo mondvas-  
ta" ŝajnas al  
mi serioza kaj honesta artikolo.  
Sed kial diable paroli pri "fuĝo al  
anarkio"? Vi certe bone scias ke  
95% el la anarkiistoj estas pac-  
istoj aŭ neperfortemuloj, kaj same  
bone scias ke *neniu* el la teror-  
ismaj grupoj estas anarkiisma: ili  
ĉiuj estas aŭ pretendas esti ĉu  
leninismaj ĉu naciismaj. Estus  
sanige publikigi liston de iamaj  
teroristoj kiuj, kiel Begin kaj Stalin,  
fariĝis ŝtatestroj.

Guy Coste, Svedio

**Laŭdinda**

De longa tempo ni bezonas la  
gazeton en Esperanto, kiu ne o-  
kupiĝas pri Esperanto sed uzante  
tiun ĉi lingvon donas la eblecon al  
esperantistaro konatiĝi kun mond-  
afraj problemoj en diversaj bran-  
ĉoj, diversaj temoj ktp. Vere laŭd-  
inda iniciato.

Boguslaw Sobol, Pollando

## En la spegulo de recenzoj

*Noto de la redakcio: Kvankam  
ĝisnunaj recenzoj pri nia revuo  
kompreneble koncernas nur  
n-ron nul de SEMAJNO kaj la  
nun realigita magazino MONATO  
iomete diferencas de tiu, ni  
opinias ke ankaŭ por vi estas  
interese legi verdiktojn de  
recenzintoj.*

**DIALOGO:**

SEMAJNO volas esti "internacia  
magazino sendependa", kiun "vi  
povas senskrupule kompari kun  
ĉiu bonkvalita nacia magazino"  
(varbilo). En la optimismo de la  
reportero - redaktoro - eldonisto  
tamen kuŝas iom da malsincer-  
eco, ĉar la profesia ĵurnalisto  
scias, ke ĉi tiu komparo ĉiam  
estos malfavora al la propra  
eldonaĵo. Ĉu li kuraĝus konkuri  
kun la germana SPIEGEL aŭ kun

la franca L'EXPRESS? Ambaŭ  
estas pli dikaj, pli riĉaj, sed pli  
malmultekostaj. Ĉi tiuj magazinoj  
havas kapablajn ĵurnalistojn, ĉar ili  
bone pagas. Ili povas bone pagi,  
ĉar ili havas egan eldonkvanton.  
Kaj ĉi lasta kondiĉo, kiu estas  
baza por ĉiu gazeto, neniam plen-  
umiĝos por SEMAJNO. La sekvo:  
artikoloj, ne aŭtentikaj sed kompi-  
litaj sen propra enketo kaj esploro,  
fare de hobiaj reporteroj kies  
nura merito estas nove enpaki ilin  
en Esperanto.

**LA ESPERO:**

Aperis numero 0 de io, kio ĝis  
nun troviĝis nur en la revomondo.

**LA BRITA ESPERANTISTO:**

Abunde ilustrita, kun aktualaj in-  
formoj el multaj mondpartoj, ĝi  
estas treege impona kaj interesa:  
apenaŭ malpli alloga kaj leginda  
ol ekzemple *Time* aŭ *Life* (vane  
mi klopodis pensi pri brita publik-  
aĵo analoga).

**BONA ESPERO:**

La magazino volas esti ekvilibra  
revuo novaĵa kaj ĝenerale kultura  
laŭ la tipo de *Time* aŭ la *Sudafrika*  
*To the point*, kun kiuj ĝi bone el-  
tenas komparon. La lingvaĵo  
montriĝas vigla kaj tre legebla, la  
enhavo vere interesa. — Pro la  
ebleco tiri klerajn kontribuantojn el  
tiom da landoj, la magazino vere  
imponas per sia tutmonda am-  
plekso kaj horizontoj larĝaj.

**RADIO ZAGREB:**

Nepre estas tipografie altnivela  
kaj enhance riĉa, klopodanta satigi  
ĉies guston.

**CENTRA BULTENO:**

Jam aperis viva specimeno (0/  
78), kaj mi devas konfesi, ke mi  
trovas ĝin elvoka kaj ekscita. Ba-  
zita sur la konata formo de la  
semajnaj gazetoj *Time*, *L'Ex-  
press*, *Der Spiegel* ktp., ĉi maga-  
zino prezentas tre adekvate ilus-  
tritan tratanĉon de hodiaŭa vivo



**Eĉ pli altaj kostoj**

("Lingva ĥaoso" en SEMAJNO, n-ro 0)

Estas tute prave, ke la Oficiala Gazeto kaj pluraj dokumentoj celataj al la membroŝtatoj (de EK — red.) tradukiĝas en ses lingvojn. Tiu situacio daŭrus, eĉ se Esperanto akceptiĝus morgaŭ kiel oficiala — aŭ eĉ la sola oficiala — lingvo de la Eŭropa Komuno. La eŭropa impostpaganto devos daŭre kontribui al la kostoj de tradukado. Estas ankaŭ notinde, ke se Esperanto akceptiĝus kiel sepa oficiala lingvo, tiaj kostoj iĝus ankoraŭ pli altaj.

Estas ankaŭ prave, ke laboras multaj interpretistoj por la EK. Sed ne ĉiu kunveno havas interpretadon de ses lingvoj en ses lingvojn. Dependas de la kunveno kaj ties partoprenantoj. Ankaŭ povas esti, ke se ne ĉeestas naciaj spertuloj, kies lingvoscioj estas eble mankaj, oni parolas nur unu ling-

von — la francan. La speciala pozicio de la franca lingvo en la EK povas atribuiĝi al la fakto ke tri el la ses originaj membroŝtatoj posedis ĝin kiel nacian lingvon, kaj ke ĝi estas la plej grava lingvo en la tri urboj kie la eŭropaj instancoj havas siajn sidejojn. Ĉiu eŭropa oficisto do regas pli malpli tiun lingvon kaj vole nevole ĝi iĝis la ĉefa el la ses lingvoj.

EK ne akceptos Esperanton morgaŭ kaj ankaŭ ne postmorgaŭ. Oni ne povas atendi ke personoj kiuj laboris dum sia tuta vivo en unu aŭ du lingvoj pri temoj ne tre facilaj, povos de unu tago al alia ŝalti al Esperanto, kie la teknikaj vortoj kelkfoje ankoraŭ mankas. Esperanto akceptiĝos kiam ĝi estas parto de ĉies edukado, ĉar tiam oni eltrovos ke interrilatoj en Esperanto estas tamen pli facilaj ol en la naciaj lingvoj, kaj tiam estos la necesa impulso ellabori la teknikajn vortojn kaj instrui la inter-

pretistojn kaj tradukistojn, kiuj restos parto de nia plurlingva socio.

Joĉjo

*(La aŭtoro de ĉi tiu letero estas oficisto de EK kaj tial petis nin ne malkaŝi lian nomon. Kvankam ni ne povas imagi ke pro tio li povus havi malfacilaĵojn, ni respektas lian deziron. redakcio)*

**Morta Maro**

Mi rilatas al la artikolo en SEMAJNO n-ro 0 pri Morta Maro. Mi aliĝas al la varma propono viziti tiun tre interesan kuraĉlokon. Sed oni devas scii: Je la okcidento la suda duono estas israela; la alia duono estas palestina ĝis la rivero Jordan; kaj ekde tie sur la orienta bordo regnas la Haŝemita Monarkio Jordano. Palestino estas teritorio konkerita per la israela armeo. La popolo vivanta tie ne estas sendependa kaj havas ne niun rajton de memdeterminado. Do ĝiaj liberig-batalantoj iafaje metas eksplodaĵojn ialoke. Lokoj de eksplodaĵoj povas esti kaj sur propra israela teritorio kaj sur konkerita teritorio. Sed diri ke ambaŭ ŝoseoj de Tel-Aviv-Jafo al la Morta Maro longas same 193 km ne okazu sen rimarko ke unu vojo trairas la okupitan teritorion, kie la loĝantaro malamas la okupantojn kaj pro tio ankaŭ la oficialajn turistojn, kaj ke estas granda danĝero tie. Ignori tion estas kiel konkerado de la konscio krom la danĝero mem. Ni ofte diras ke turismo estas ilo de pacfarado — sed nur kondiĉe por malfermit-konscia tendenco de la turistoj. Kiu iras tien, devas rilati al la politika situacio, alie li partoprenus la batalon unuflanke.

J.T. Šik, Jafo (Israelo)

**Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn.**

en la tuta mondo. — Eble la plej "normala" gazeto iam ajn aperinta en la internacia lingvo, la eldonisto sendube konstatas, ke la abonprezo fortimigos la grandan plimulton almenaŭ de negermanaj samideanoj ... Ĉu ne estus pli prudente komenci per simila gazeto MONATO?

+

Kun ĝojo mi tralegis n-ron nul de Semajno. Ĝi estas profesnivela kaj varienhava. — La signifo por la esp.-parolantoj estus granda. Jen eblo por disvastigi sian scion pri la mondo. Inter alie — sed ne ekskluzive — pere de artikoloj skribitaj de homoj, kiuj hejmas en la koncernaj medioj kaj regionoj kaj tial parolas la lokan lingvon. Ankaŭ por Esperanto la signifo estus granda. Jam dum jaroj la ĉiutaga profesia uzo de Esperanto en la radiofonio tre utilas al la evoluo de la lingvo.

(En CENTRA BULTENO aperis du recenzoj.)

**ESPERANTO:**

La numero estas teknike bela, varia, kompetente redaktita, aktuala, io kion la Internacia Lingvo jam delonge bezonas. Ĝi promesas realiĝon de malnova revo, ĝi transportas nin jam en la duan jarcenton de Esperanto.

**HUNGARA VIVO:**

Internacia, nemovada, abunda magazino — Esperantlingva — neamatora; leginda laŭ la plej diversaj intereso, distra ankaŭ por la familio, kun aktualaĵoj kaj gravaj aferoj de la mondo; bunta kaj ilustrita, sur bona papero eminente presite: jen koncize kion la provnumero per gratulinda maniero prezentas al la gape surprizitaj legantoj. — Por enigmoj kaj konkursoj premiojn disdonos la nova revuo; la ĉefan premion jam nun certe meritas la redaktoro.



# Religio kun aŭ kontraŭ Politiko

Sendube estas tro frue analizi la revolucion en Irano, kiu ankoraŭ ne finiĝis nek solidiĝis. Tamen du punktoj estas tute evidentaj: 1e en Irano temis kaj temas pri revolucio el fundoj kaj fontoj de religio islama. 2e ĉi tiu religia revolucio direktis sin kontraŭ politiko. Sufiĉe da motivoj kaj instigoj do analizi la situaciojn en aliaj landoj kaj mondregionoj kaj demandi konkrete: Ĉu entute eblas ke ie en la mondo la du sferoj religio kaj politiko estas sen reciprokaj influoj? Kaj se ekzistas ligo inter la du sferoj, ĉu religio direktas sin kontraŭ politiko (aŭ inverse) aŭ ĉu unu subtenas la alian?

Precipe en la okcidenta hemisfero la observantoj gapis pro estiĝo kaj sukceso de la irana revolucio. Oni faris similajn erarojn kiel la irana ŝaho mem: Oni ignoris, ne sciis aŭ forgesis ke islamo ne estas disigebla laŭ la sferoj religio kaj politiko, ĉar islamo estas koncepto ampleksanta la tutan, kompletan vivon de la homoj.

En tio ĝi tre similas al la juda religio. Tial unue ni rigardu al la ŝtato Israelo, kie jam delonge funkcias forta interplektiĝo de religio kaj politiko.

Israelo havas tre seriozajn problemojn kun la religiaj partioj en la parlamento. Religiuloj pli aŭ malpli ekstremaj reprezentas 20% de la voĉdonantoj por la parlamento (Kneset). La laborpartio kaj la liberaluloj neniam atingas pli ol 40% da parlamentanoj, pro tio ĉiam estas bezonata helpo de religiuloj por fari stabilan koalicion. La religiuloj scias bone eluzi tiun faktan por — iom post iom — enigi religiajn leĝojn en la sekularan leĝaron.

Religio havas jam sufiĉe multajn atingajojn en Israelo. Publika trafiko ne funkcias sabate (sankta tago). Trajno kaj aŭtobusoj ripozas. Privataj aŭtomobiloj kaj taksoj ne estas limigitaj en veturado, sed ĉiuj urboj kaj kvartaloj, kie loĝas religiuloj, estas por la tuta trafiko fermitaj.

La plej granda religia atingajo estas, ke la edziĝa leĝaro estas en la manoj de la rabenoj (religiaj gvidantoj) kaj ili agas laŭ la leĝoj de antaŭ 2000 jaroj kaj ne akcep-



*Religia kaj revolucia gvidanto en Irano Komejni (titolpaĝo)*

tas iun ajn ŝanĝon. Ĝi kaŭzas multajn strangajn kaj ofte kruelajn kazojn, kiuj ne estas eviteblaj, kiam religiaj partioj estas en koalicio. Laŭ tiuj leĝoj miloj da diversaj viroj kaj virinoj ne povas geedziĝi. Ankaŭ eksedziĝo dependas de tiuj leĝoj kaj estas atingebla nur se divorcon postulas viro. En rabena juĝejo virino neniam pravas. Eĉ atesto de virino havas nenan valoron. Ne povas ankaŭ edziĝi judo kun alikonfesiulino. Ĝi ankaŭ rilatas arabojn — kaj la arabaj religiaj aŭtoritatoj estas tre kontentaj pri tiu leĝo. Judo ne povas rezigni pri sia konfeso kaj Israelo ne konas senkonfesiulojn.

La industrio ne povas labori sabate, eĉ se la sabata paŭzo kaŭzas grandajn ekonomiajn perdojn. Oni ne povas bredi en Israelo porkojn en judaj vilaĝoj. Permesite estas tamen bredi ilin en kristanaj arabaj vilaĝoj. Estas tamen

malhelpoj por vendi ilian viandon. En israelaj veturiloj (ŝipoj kaj aviadiloj), en armeo kaj malsanulejoj la manĝaĵo devas esti koŝera (laŭrite pretigita); tio kaŭzas gravan ekonomian ŝarĝon por la malriĉa israela ŝtato.

Knabinoj kiuj deklaras ke ili estas religiaj ne devas militservi. Religiuloj ankaŭ havas monopolon por entombigo, cirkumcido, ŝanĝo de la kredo (judiĝo).

Nuntempe israelaj piuloj ne volas kapti por si mem la aŭtoritatan povon, ĉar ili scias, ke la ŝtato ne povus ekzisti laŭ la religiaj leĝoj. Ili kontentiĝas nun per aldonaj postuloj: malpermeso de aborto; cenzuro de filmoj kaj teatraĵoj, por ke neniu seksa afero aperu sur ekrano aŭ scenejo, kaj fine ili postulas, ke la rajton decidi pri ĝi havu la rabenoj... Post kiam ili tion atingos, venos novaj postuloj.

Israela religia leĝaro troviĝas ie en la mezo inter la eŭropa katalika kaj islama leĝaro. Interese estas, ke islamaj religiuloj en Israelo subtenas religiajn postulojn de judaj religiuloj, malgraŭ la kuriozaĵoj kiuj povas okazi pro ilia malidenteco. Ekzemple laŭ la juda leĝo infano de arabo kaj judino estas — judo, laŭ islama — arabo. Ĝis nun la afero ne estas solvita kaj de tempo al tempo naskiĝas tiuj homoj, kiuj ne povas laŭleĝe decidi pri sia religio aŭ nacieco.

Ĝis nun ne ekzistas danĝero en Israelo de irana revolucio, sed ĉiam restas la timo, ke iom post iom sen revolucio la religio superregos Israelon.

## PAPO EL POLLANDO

Tute alia estas la situacio en Pollando, kiu estas socialisma kaj do ateisma ŝtato — kaj tamen jen lando, kie malgraŭ oficiala ateismo religio kaj nacio estas simile identaj kiel en Israelo — unika



**Autoroj:** Earl Bills, Renato Corsetti, Philippe Cousson, Roberto Giuliani, Tomasz Jan Kudrewicz, Eléus Leonardo de Sá, Henrik Mašler, Claude Piron.

**Kompilis:** Stefan Maul.

fenomeno en orienteŭropa socialismo. Poloj je 90% estas baptitaj romkatolikoj.

Post la dua mondmilito pro limŝanĝoj kaj pro amasaj transloĝiĝoj Pollando iĝis preskaŭ homogena nacie (naciaj minoritatoj konsistigas nun nur ĉ. 1,5% de la loĝantaro). Ĉar samtempe la regadon transprenis marksistoj (do, ateistoj), oni povis supozi, ke venos 'nigraj tagoj' por religioj en Pollando. Tiuj antaŭvidoj evidentigis eraraj.

Nun en la lando agas egale dudek registritaj eklezioj kaj krome naŭ lokaj religiaj komunumoj. Oficiale aperas kelkdeko da religiaj gazetoj kaj revuoj. Funkcias tri religiaj altlernejoj, el kiuj du estas financataj de la ŝtato, kaj krome pluraj romkatolikaj seminarioj por ontaj pastroj. Infano povas lerni religion de siaj gepatroj en apudpreĝejaj instruejoj. Agas kelkaj kooperativoj, produktantaj diversajn religiajn objektojn, librojn ktp. Tri religiaj societoj estas reprezentataj en la pola parlamento — Sejmo.

Kompreneble, inter kredantoj kaj ateistoj daŭras viglaj diskutoj. Sed tiuj diskutoj havas mondkonceptan, ne ideologian aŭ politikan karakteron. La dividon 'kredantoj-ateistoj' oni neniam miksu kun la divido 'komunistoj-kontraŭkomunistoj'. Ja ekzistas ateistoj, kiuj estas samtempe kontraŭuloj de la socialisma sociordo en la lando, kaj ekzistas multegaj kredantoj, kiuj aprobas kaj subtenas la politikon de la reganta partio. La fakto, ke la historio de Pollando estis ĉiam forte ligita kun kristanismo kaj ke plimulto de poloj estas romkatolikoj, devigas nin dediĉi specialan atenton al rilatoj inter la pola socialisma ŝtato kaj la romkatolika eklezio. Kontraŭakomunista sinteno de papo

Pio 12a influis tiujn rilatojn tre malbone. La reciprokaj rilatoj iomete "varmiĝis" post la 2a Vatikana Koncilio, sed nur en la 70aj jaroj, kiam Papo Paŭlo 6a akomodis la diocezajn limojn al la ekzistanta ekde 1945 ŝtatlimo inter Pollando kaj Germanio, ili povis vere normaligi. Ambaŭ flankoj fondis konstantajn komisionojn por reciprokaj laborkontaktoj, kiuj tuj aktive eklaboris, kaj en 1977 pola parti-gvidanto Edward Gierek [Edvard Gjerek] vizitis la papon en Vatikano.

Apartan signifon havis la elekto de pola kardinalo Karol Wojtyła [Vojtiŭa] kiel papo Johano Paŭlo 2a. Meze de 1979 li vizitis Pollandon, kaj i.a. interparolis kun ĉefaj funkciuloj de la pola ŝtato; dum tiu vizito plurfoje estis esprimita ambaŭflanka deziro plibonigi reciprokajn rilatojn. Estas evidente, ke malgraŭ pluraj opini-diferencoj la romkatolika eklezio kaj polaj komunistoj havas ankaŭ kelkajn komunajn celojn — unu el la plej gravaj estas firmigo de la monda paco. La dialogo do daŭros ankaŭ kaj verŝajne eĉ intimiĝos la kunlaboro.

## NACIO SUB DIO

Alia lando, kiun la pola papo vizitis antaŭ nelonge, estas Usono, kie — alie ol en Pollando — ne


ekzistas homogena religieco, kies prezidento tamen estas religiulo, predikisto. Usono havas evidente religian tradicion.

"Unu Nacio sub Dio" diras la promeso de fideleco al la usona standardo. Hodiaŭ du voĉoj leviĝas kontraŭ tiu deklaro. Unu diras ke Usono ne plu estas tia, kaj alia ke Usono devus ne esti tia.

S-ino Madalyn Murray O'Hair [Oher] kaj ŝia Usona Ateisto-Asocio argumentas kontraŭ registara favoro por religio. Por subteni sian argumenton, ŝi citas la Unuan Aldonon al la usona konstitucio: "Kongreso ne starigos leĝon kiu favoros iun religian estaĵon aŭ kiu malpermesos la liberan ekzercadon de religio." Aŭtune 1979 O'Hair procesis kontraŭ la permeso donita al la papo celebri meson ĉe la publika placo ("The Mall") antaŭ Kapitulo en Vaŝingtono. Laŭ O'Hair, tian uzadon de publika loko per religia estaĵo (t.e. katolikoj) malpermesas la Unua Aldono pro "favoro" tiel donita al katolikoj. La nekutima rapideco, per kiu la juĝistaro (inkluzive Superan Tribunalon) decidis kontraŭ ŝi, montris la registaran subtenon de libera ekzercado de religio ĝenerale.

O'Hair komencis sian longan historion de tiaj procesoj en 1963. Ŝi batalis defendi sian filon (ankaŭ ateisto) kontraŭ devigajn preĝojn

→



Politiko per vojaĝoj: Papo en Pollando (maldekstre) kaj Usono — titola paĝo de magazino usona





Karikaturo demonstros la iamajn timojn en Usono: romkatolikaj prelatoj kvazaŭ aligatoroj kun mitroj (espiskopaj kapvestoj) invadas la nord-amerikan kontinenton

en lia lernejo. Tiu proceso, kune kun simila proceso de S-ino Edward Schempp [Ŝemp] de Pensilvanio, estiĝis la kaŭzo de fama decido de la Usona Supera Tribunalo, kiu malpermesis devigan preĝadon en publikaj lernejoj. O'Hair estiĝis centro de konflikto dum la sekvantaj jaroj, procesanta malpermesi al publikaj oficistoj menciigi ion ajn pri siaj religiaj kredoj en publiko. Ŝi procesis kontraŭ la astronautoj, kiuj ĉagrenigis ŝin en 1968 per legado el la biblio de la luno. Ŝi batalis por forstrekigi la vortojn "In God we trust" ("Al Dio ni fidas") sur usonaj moneroj.

Malgraŭ la penoj de O'Hair kaj aliaj ateistoj, religiaj grupoj simile laboras enmeti siajn principojn en leĝojn de la lando. La tutnacia grupo Eagle Forum (Agloforumo) publikigas kristanan vidpunkton rilate al politikaj aferoj. Religio ankaŭ estas kialo por kontraŭi la uzon de registara mono por financi aborton. Tamen, religiaj grupoj malsukcesis en la batalo daŭrigi la leĝojn, kiuj antaŭe malpermesis aborton.

Usono restas, malgraŭ la konflikto, lando esence religia. La vizito de papo Johano Paŭlo 2a estis okazo montri tion. Kvankam la usona registaro rifuzas oficiale rigardi la papon ĉefo de ŝtato (t.e. Vatikano), oni akceptis lin elegante kiel ĉefon de religio. Homoj de ĉiuj religioj honoris lin. Li diris meson ne nur sur "The Mall" en

Vaŝingtono, sed eĉ sur la "Komuna Placo" de Bostono. Antaŭ 200 jaroj oni festis ĉiujare sur la sama placo "Papotago"n, bruligante figuraĵon de la papo!

Religio restas grava afero en usona politiko. Prezidento Jimmy Carter [Kat'r] proklamis sian kristanan fervoron kiel "renaskito" ("Born Again" angle) en 1976. Ĵurnalaj raportoj pri li leganta la biblion ĉiutage kaj instruanta biblian klason ĉe sia eklezio baptista helpis al li akiri la voĉdonojn de milionoj da evangeliaj kristanoj. Al judoj li deklaris sian subtenon de Israelo pro sia religia kredo, ke dio ja donis la landon al la juda nacio.

La deziro eviti religiajn konfliktojn kaj militojn kiel en Eŭropo instigis la fondintojn de multreligianacia Usono deklari perleĝe religian liberon. Ironie, la konflikto rilate al ĝustaj naturo kaj limoj de tiu libero restas ĝis nun.

En Latinameriko la situacio estas tre komplika. Tie ĝis la 19a jarcento la (romkatolika) eklezio estis la mentoro de la homoj, la ŝtatoj obeadis la eklezion kvazaŭ oni respektus la arkitekton de la universo mem. Kelkfoje oni planis eĉ teokration. Intertempe la situacio sur tiu kontinento funde ŝanĝiĝis: la troa identiĝo de eklezio kaj ŝtato rezultis forkuron de kredantoj kaj en ne malmultaj ŝtatoj ekstis strikta disiĝo de religio kaj politiko — ja eĉ en kelkaj nun-

tempe la eklezio opozicias al la reĝimo kaj ellaboris "teologion de revolucio". Evidente estas, ke ankaŭ sur tiu kontinento ambaŭ sferoj pli-malpli forte influas reciproke.

Revenante al Eŭropo, ni konstatis ke en ĉiu okcidenta ŝtato en iu maniero religio ludas rolon ankaŭ en politiko. Ni rigardu la francan situacion.

"La respubliko nek agnoskas, nek salajras, nek subvencias iun kulton." Tiel tekstas leĝo de la 9a de decembro 1905, nomita leĝo de disiĝo, kiu tute sendependigas la ekleziojn de la ŝtato. La ŝtato ne plu intervenas en nomigo de pastroj nek en aliaj ekleziaj aferoj. La antaŭa statuto estis la Napoleona konkordato. La kontraŭklerikalismo de la periodo inter la du lastaj jarcentoj estigis ĉi tiun leĝon.

Jen kelkaj opinioj pri la situacio. La prezidanto Georges Pompidou [Ĵorĵ Ponpidu] skribis: "... devas ekzisti inter tiuj ĉi du institucioj (ŝtato kaj eklezio) nur mutuala respekto kaj reciproka konsidero, tiam, kiam ĉiu daŭras fidela je si mem." Kardinalo François Marty [Fransŭa Marti] diris pri la episkopa posteno: "Mi devas lasi min "uzi" de neniuj grupo, neniuj sociaj klasoj, neniuj ŝtatoj." La Franca Protestanta Federacio (F.P.F.) skribas en dokumento "Eklezio kaj potencoj": "Obeado al dio kaj servo de la fratoj estas do la nuraj kialoj, kiuj povus devigi la eklezion interveni en la kampo politika kaj sociala." En Francio la plejmulto estas katolikoj, sed estas kelkaj protestantoj (4%). Estas ankaŭ sufiĉe multe da islamanoj (plejmulte fremdaj laboristoj) kaj judoj. Al la demando "Ĉu kiel institucio, la eklezio ne devas fari politikon?" kardinalo Marty respondis: "Oni devas konsenti pri tio. La eklezio ne loĝas en la nuboj. Ĝi kampadas en la mondo, ĝi konsistas el homoj." En Francio, kvankam estas neniuj oficialaj, leĝaj ligoj inter politiko kaj eklezioj, ĉi-lastaj, kiam ili pensas ke estas utile, parolas, deklaras pri diversaj politikaj, socialaj kaj mora-



laĵ temoj. Lastatempe estis deklaracioj kaj polemikoj pro la leĝo pri aborto. Kiu estas la influo de tia deklaracioj? Kvankam la eklezioj ne partoprenas en la decidoj, eble estas influo ĉe balotadoj kaj en la konsciencoj de la kredantaj decidantoj.

Konfliktoj inter politikaj partioj kaj eklezioj estas ankaŭ en aliaj okcidenteŭropaj landoj, plej ofte ja pro leĝoj pri aborto. Precipe akra la diskuto estis kaj estas en FRGermanio, kie la situacio estas aparte komplika, ĉar la eklezioj ricevas propran imposton, kiun enkasigas por ili la ŝtato, kiu inverse profitas pro la fakto, ke la plej granda parto de socialaj institucioj estas en la manoj de eklezioj. Kaj neniu havas intereson ŝanĝi ĉi tiun historie kreskintan situacion. Montriĝis ke socialaj institucioj foruzas multe pli da mono, se ili transiras en ŝtatan prizorgon.

## HISTORIA KOMPROMISO?

Pro aborto ankaŭ en Italio, sidejo de la Vatikano, ekestis konfliktoj inter katolika eklezio kaj la partioj. Sed aldoniĝas en ĉi tiu lando, ke ĝi estas la sola okcidenteŭropa ŝtato kun vere forta komunisma partio.

En la lastaj jaroj *krizo* estas la sloŝila vorto de la itala politika vivo. Krizas instancoj, krizas valoroj, krizas ekonomio, krizas ideologioj. Ĝis nun du "eklezioj" klopodis doni ĉiujn respondojn al ĉiuj demandoj: katolika eklezio kaj komunisma partio. Evidente ili estas inter la instancoj plej tuŝataj de la krizo.

Religio ne plu funkcias kiel "instrumentum regni", kiel regilo. Ĝi ne plu, almenaŭ tendence, kapablas garantii efikan kunligon inter povo kaj socio. Povo, tio estas la kompleksa fandujo de regantaj celoj, instancoj kaj valoroj, malkovras ke religieco estas hodiaŭ neutila por pli bone regi la nunan socion, por instigi homojn "hodiaŭ kaj ĉi-tie" senti kaj fari ion.

Konsiderado de konkretaj bezonoj tra la prismo de religiaj konceptoj estas io profunde fremda por la

nuna itala homo, kiu reagis mirenekrede je informoj pri landoj kiel Irano, kie homoj agas pro religiaj motivoj. Baget Bozzo (Baĝet Boco), unu el la plej malfermitaj italaj teologoj, daŭre insistas por montri ke la krizo estas pli profunda ol oni supozas. Ĝi tuŝas la kernon mem de religieco. Ĝi rilatas al la pravigoj kaj al la kulturaj kialoj de kredado.

Se la itala episkopa konsilantaro ploras, la Centra Komitato de la Itala Komunisma Partio ne ridas. En la kvindekaj jaroj, kaj pli frue, komunismo prezentiĝis al italaj malriĉaj amasoj kiel alternativa, "totala" kulturo.

Intertempe, tamen, la itala socio evoluis kaj komunismo postrestis. Ĝi daŭre klarigis la nunan socion per iloj taŭgaj por klarigi alian socion, kaj tio sufiĉas por malproksimigi ne malmultajn intelektulojn. Bedaŭrinde por la Centra Komitato, kaj bonŝance por la italaj konservemaj fortoj, la itala komunisma kulturo ŝtoniĝis. La fendo inter la juna generacio kaj IKP pli kaj pli larĝiĝis. Sed la veran grandan fendon inter la amasoj kaj IKP kaŭzis la "historia kompromiso", kiu estas komprenata de normalaj homoj kiel la identigo IKP kun la povo.

Kvankam je ĉiu formala okazo KD, Kristana Demokratio (en la itala: DC = Democrazia Cristiana), emfazas sian kristanecon kaj sian pretecon defendi la eternajn valorojn de la okcidenta kristana socio, en la praktiko ĝi estas nur povo-sistemo. KD estas povo kaj ĝi estas apogata de la katolika eklezio, kiu ankaŭ partoprenas en la povsistemo.

Kaj en ĉi-tiu situacio falas la gvidlinio de la Centra Komitato de IKP "Ni volas kunlaboron inter la komunismaj kaj la katolikaj popolaj amasoj". Per tiaj sloganoj oni lanĉis la historian kompromison, kiel kompromison inter du malsamaj kulturoj. Bedaŭrinde kiam Berlinguer, la sekretario de IKP kiu fariĝis simbolo de "historia kompromiso", lanĉis sian novan strategian linion tiuj du malsamaj kulturoj efektive ne plu ekzistis.

La historia kompromiso estis nova versio de la malnova itala praktiko "Ĉio ŝanĝiĝu por ke nenio ŝanĝiĝu!". IKP fariĝis garantianto de la ekzistanta socia ordo kaj ĝi surpris respondecojn pri ĉio misfunkcianta, ankaŭ kiam objekte ĝi ne respondicis.

La lastaj voĉdonadoj montris ke ankaŭ la komunisma "religio", tamen, estas en krizo. La komu-

→



*Romkatolika eklezio jam tial havas politikan influon, ĉar ĝia centro, Vatikano, estas ŝtato — agnoskita ne de ĉiuj aliaj ŝtatoj, tamen ekzemple ankaŭ membro de UN. Rezentantoj de aliaj ŝtatoj — kiel sur ĉi tiu foto reĝino Margrete de Danlando kun ŝia edzo — do en Vatikano estas akceptataj per diplomatiaj ceremonioj.*



nismaj amasoj pli kaj pli ekdubas pri siaj "pastroj" kaj rifuzas "fidi". Finfine, en ĉi tiu "krespusko de religioj" ŝajnas ke la vera fendo, je profunda nivelo, en Italio ne estas inter homoj iel influataj de religio kaj homoj iel influataj de komunismo, sed inter homoj kun valor-sistemo (ĉu katolikeca ĉu komunismeca) kaj homoj sen preciza valor-sistemo, aŭ pli ĝuste kun valoroj, kiuj estas akcepteblaj nek por tradiciaj katolikoj nek por tradiciaj komunistoj. Al la veraj demandoj de la homoj respondas nek la eklezio nek la oficiala marksismo.

## FENOMENO TUTHOMARA

Al la enkonduka demando — tion montras ĉiuj traktitaj ekzemploj — ĉu eblas ke la sferoj religio kaj politiko restas sen reciproka influo, oni do devas diri absolute klare: ne, tio ne eblas, ne okazas. Kiel klarigi ĉi tiun evidentan fenomenon?

Homoj ne povas vivi sen alpreni starpunkton pri la senco de sia ekzisto. Kelkfoje konscie, ofte nekonscie, ni vole nevole havigas al ni respondon al bazaj demandoj. Krome, funde de nia estaĵo vivas bezono *rilati*. Rilati al la aliaj homoj, al la naturo, al la kosmo, esti iamaniere ligitaj al vivantoj per ligoj nerompeblaj, kiuj ebligu al ni disvolviĝi ame, kree kaj sekure, kun sento pri propraj valoro kaj digno.

Bedaŭrinde, nia bezono starigi eternajn rilatojn kaj trovi respondon al bazaj demandoj ne kontentiĝas ĉi-tere: tro multaj ligoj disrompiĝas, kaj tro multaj fundamentaj informoj mankas al ni. Kelkaj personoj, jen pro feliĉa hazardo, jen post longa stumbla spirita irado, tamen trovas certecon, ne racian — tio ne eblas — sed intuician aŭ emocian, kaj ili vivas serene. Multaj, aliflanke, tion ne atingas, kaj ilin tenas angoro, ofte ne sentata, ĉar kaŝita sub ĉiaspecaj strebadoj. Sed egale ĉu en la personeco ĉefrolas sereneco aŭ pli malpli maskita angoro, ĉiu nepre devas aliĝi al iu vivprin-

ciparo kaj iel fari al si bildon pri la universo, la socio, kaj la propra rolo en ĝi. Tiel difiniĝas sinteno religia aŭ prireligia.

La respondojn al la fundaj demandoj kaj la bazan starpunkton pri la vivo la homo ne ĉerpas el si. Nia infanaĝo disvolviĝas en medio, kiu trudas al ni limigitan nombron da modeloj kaj doktrinoj, favorante iu(j)n kaj malfavorante aliajn per tre premaj fortoj, al kiuj ni cedas aŭ ribelas. Sub ties influo ni forĝas al ni identecon. "Mi estas budhista", "mi estas marksista", "mi estas katoliko", "mi estas senkreda", tiuj estas gravaj elementoj en la maniero, laŭ kiu ni



*Usona edzino de iranano demonstracias por Komejni antaŭ la okupita usona ambasadejo en Teherano*

perceptas nin mem, la aliajn, kaj la tutan universon.

Al religio homoj emas asocii la aliajn ĉefelementojn de la identeco, i.a. la etnan kaj la socian, kaj en tiun spontan anasimilon facile enŝoviĝas la plej primitiva el la manieroj klasi, nome la divido inter "bona" kaj "malbona", inter "amikoj" kaj "malamikoj", kun ties terura perfortopotencialo. Tiel al irlandano ne gravos, ĉu s-ro lu estas bonkora aŭ ne, ĉu lia religia sinteno estas aŭ ne aŭtenta, sed nur ĉu li estas protestanto aŭ katoliko, kio ebligos lin difini kiel "por" aŭ "kontraŭ". Same, por multaj irananoj hodiaŭ la fakto, ke iu ne estas islamano, sufiĉas por igi tiun suspektinda.

Tamen ni ne konfuzu la du ĵus cititajn ekzemplojn, ĉar la streĉ-

iĝoj, kiuj ilin karakterizas, estas ege malsamaj. En Irlando, la konflikto koncernas sociajn grupojn, kaj la religia aparteno estas ĉefe signo de historia origino: la konflikto okazas inter homoj kun grandparte similaj vivkonceptoj. Sama situacio povus prezentiĝi sen la religia dimensio, se ties rolon ludus alia faktoro, ekzemple lingva aŭ kultura, kiel montras la ekzemplo de la vaskoj en Hispanio. En Irano la problemoj havas pli profundan metafizikan radikan. Ja temas pri streĉiĝo inter du tute diferencaj manieroj rigardi la mondon, inter la fortoj pri "materio" kaj la fortoj pri "animo".

Ĉar politiko regas la socian vivon, kaj la metafizika starpunkto — sciate aŭ ne — la individuan, religio kaj politiko neeviteble interkroĉiĝas. La maniero, laŭ kiu ili interrilatas, dependas de multaj historiaj kaj socipsikologiaj faktoroj. Ili povas lukti unu kontraŭ la alia, kiel okazas ofte, kiam la povohavantoj trudas iun difinitan doktrinon al popolo ne inklina ĝin akcepti. Aliflanke, ambaŭ povas konverĝi al sama direkto, kio multobligas la forton de ilia energi-ŝargo. Tiu kunordigo povas konduki al fanatikeco, kiel montris la nazia ekzemplo, en kiu speco de pagana mistiko samdirektis kun politikaj tendencoj, sed ne necese: en landoj, kie kaj la politikaj kaj la religiaj konceptaroj estas trasorbigitaj de toleremo, ili prezentas reciprokan garantion pri tio, ke la homa persono estos respektata.

Ne estas facile labori por materia kaj socia progreso plene konsiderante ankaŭ la spirita bezonojn, kiuj radikas en la individuo, same kiel strebi al spirita progreso individua inkluzivas la tenton neglekti la materiajn kaj sociajn valorojn. Individuoj kaj socioj sekve inklinas akcenti unu el la polusoj malfavore al la alia, forgesante, ke ne ekzistas plena religio sen konsidero al materiaj kaj sociaj bezonoj, nek sana politiko sen atento al la profunda spirita sopiro de la homo, eĉ se tiu soifo ĉe multaj restas grandparte nekonscia.



## Homaj rajtoj kaj internaj aferoj

La plej kontroversa ero de la fina akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo (KSKE), decidita en Helsinki, sendube estas la preskribo ke neniu ŝtato intervenu en la internajn aferojn de alia. Estis antaŭvideble kaj antaŭvidate ke certaj registaroj misuzos tiun parton de la interkonsento. Eĉ ne longe daŭris, ĝis tio okazis.

Ankaŭ ne estis malfacile diveni kiuj estos la misuzantoj. Kaj tiel estis. Kun la escepto de la Respubliko de Sudafriko preskaŭ ĉiuj landoj, kiuj akuzis pri interveno en siajn internajn aferojn, apartenas al la tielnomata "orienta bloko". Kurioze, sed ne surprize, la "internaj" aferoj de la tiel ofendiĝemaj ŝtatoj konsistas plejparte en iliaj propraj ofendoj kontraŭ la homaj rajtoj.

Feliĉe ekzistas ankoraŭ en konsiderinda parto de la mondo relative ĵurnalista libereco. Kvankam la grado de objektiveco en la gazetaro kaj aliaj amasmedioj

ofte estas debatinda kaj debatata, ĵurnalistoj, iliaj klientoj kaj seriozaj politikistoj konstante kaj prave observadas kaj kritikadas la abuzojn de la homaj rajtoj kie ajn. Ili ĉiuj, ĉu rasa diskriminado en landoj regataj de anglosaksidoj, ĉu torturado de politikaj kontraŭuloj en latinidaj landoj, ĉu senproportia punado de disidentoj en slavaj socialismoj, ĉu antisemitismo inter semitoj — vekas la zorgon, suspekton, malaprobos kaj foje ĉagrenon inter tiuj kiuj vere kredas je la fundamenta egaleco de ĉiuj homoj kaj akceptas la Universalan Deklaracion pri la Homaj Rajtoj kiel gvidliniojn por la bazaj sociaj interrilatoj.

La reagoj de la publiko al rompoj de la homaj rajtoj levas ilin el la nivelo de la nuraj "internaj" aferoj de unuopaj grupigoj, ĉu komunumoj, ĉu asocioj, ĉu ŝtatoj, ĉu aliancoj. La registaroj ne estas kompetentaj pri la homaj rajtoj mem; ili nur prirespondeblas la garantiadon de ili.

Dum en la mondo la publika opinio ankoraŭ estas komunikebla, la homaj rajtoj kaj la krimoj kontraŭ ili estas komuna intereso. Kio tuŝas la homajn rajtojn, tio estas *homara* afero, kaj ne la "interna" afero de iu ajn ŝtato.

Gerald Tucker

## Puno por dormo energi-politika

La mondvasta energi-krizo ne venis surprize, kvankam oni ja ne povis antaŭvidi ekzemple, ke pro la revolucio en Irano — unu el la plej gravaj naftolandoj — de tie dum pluraj monatoj de la lasta jaro tute ne venis la tiel necesa fluidaĵo kaj ke pro ideologiaj motivoj Irano ne liveras al ĉiuj industriŝtatoj. Sed ke la rezervoj tutmondaj ne estas poreterne neelĉerp-eblaj, tiun fakton sciis delonge ĉiu lernanto, des pli kompreneble politikistoj, industriistoj kaj sciencistoj. Tamen ŝajnas ke ĉi tiu fakto absolute ne zorgigis iun el ili aŭ almenaŭ ne nervozigis. Male, en blinda kredo oni kvazaŭ ekstaze rigardis al la industria kresko kaj foruzis pli kaj pli multan nafton ĉiujare, eĉ pagis pli kaj pli multe, kiam la produktolandoj same kiel la petrol-kompanioj postulis pli altajn prezojn.

Motivoj por la plialtigo de la prezoj estis diversaj. Kelkaj naftolandoj ekkonis, ke ne tro rapide ili devas ekspluati siajn provizojn, por ne iutage resti sen enspezoj. Aliflanke ili ekkonis ke per pli altaj prezoj ili havas duoblan profiton: La enspezoj restas same altaj malgraŭ eventuala reduktita vendo — kaj pro la reduktita vendado ili pli longan tempon povos enkasigi monon. Dume ili povas trankvile establi industrion en la propra lando aŭ investi sian monon

en industri-landoj. La industrilandoj siavice ne ĉagreniĝis pro tio, ĉar en ambaŭ kazoj ili profitis, ricevante taskojn en naftolandoj aŭ akceptante riĉajn investantojn hejme. Plej bone tamen profitis la petrol-kompanioj ...

Tamen la industrilandoj apenaŭ reduktis sian foruzon de petrolo, male. Eĉ post patosaj promesoj dum tiucela konferenco de la plej riĉaj industriŝtatoj ekz. Usono tute ne kaj aliaj industrilandoj nur iomete atentis la proprajn ŝpardecidojn.

Dume oni fidis je nova energio per atomreaktoroj, ĝis vekiĝis la revantoj abrupte kaj draste pro la akcidento en reaktoro en Harrisburg. Nun la rezisto kontraŭ ĉi tiu sendube plej danĝera energiproduktado mondvaste eminente plifortiĝis. En multaj industrilandoj ĉi tiu rezisto de la popolo estas tiel efika, ke preskaŭ ne plu eblas finkonstrui kaj tute ne novkonstrui atomreaktorojn.

Oni vere devas akuzi politikistojn kaj sciencistojn, ĉar ili dum multaj jardekoj aŭ eĉ jarcentoj tute ne zorgis pri evoluigo de aliaj energioj. Ĉu oni ne povas imagi, ke ni hodiaŭ havus malmultekostan energion per vento, suno, akvo kaj aliaj elementoj, se oni celkonscie esplorus kaj inventus?

Tial vere oni ne povas kompati la industriajn landojn, male oni povas nur esperi ke la fiasko de ilia ĝisnuna energi-politiko finfine kondukos ilin al la ekkono, ke ne senpune oni simple povas ekspluati la teron sen konsidero pri la estonteco.

Stefan Maul



# Hardado de la korpo: Fonto de sano



Kiril Kalčev prezentas al vi sian metodon hardi la korpon per malvarma akvo. Al ĝi li venis post grava malsanado je artik-reŭmatismo dum la jaroj 1939/40 kaj je muskola reŭmatismo dum 1943/44. Tiuj danĝeraj malsanoj devigis lin direktiĝi al naturkonforma maniero de vivo, uzante pli kaj pli la vivodonajn fortojn de la naturo: suno, akvo kaj movo. En tio li sekvas la faman pastron Kneipp [Knajp], kiu en Eŭropo diskonigis tiujn metodojn. Legu raporton pri la spertoj de nia bulgara aŭtoro: Kiel rezulto de la ĉiutaga aplikado de la akvaj procedoj, kiuj esprimiĝis en surverŝado kaj banado en la rivero, kiu trapasas nian urbon, dum ĉiuj kvar sezonoj de la jaro kaj vegetara dieto, akompanata de perioda fastado, la reŭmatismo malaperis. Jam pasis 34 jaroj de post mia unua kontakto kun la

*Eksmalsanulo de artikreŭmatismo, Kiril Kalčev, komforte sentas sin en la glacimalvarma akvo. "Rosmarado" estas la fina stadio de hardado per malvarma akvo.*

malvarma akvo, kaj mia korpo hardiĝis ĝis tia grado, ke nenia frostoj povas kaŭzi al mi malvarmuman malsanon. Nazkataro, tuso, malvarmumo jam estas por mi nekonataj eventoj. Mi faris multajn eksperimentojn, kiuj nedisputeble pruvis tion. La lasta eksperimento konsistis en tio, ke mi banis min 30 minutojn en la rivero, kies temperaturo estis + 11° laŭ Celsius. La postan tagon frumatene mi faris novan banadon ĉe akvotemperaturo de 8° C, kiu daŭris 15 minutojn. Neniama suferado ne nazakataro kaj malvarmumo mi spertis, sed ĝojon, bonhumoron, vigecon.

En mia longdaŭra praktikado de la hardado per malvarma akvo mi

konstatis, ke la malvarma akvo ne estas tiom danĝera faktoro, kiom opinias multaj homoj. Kontraŭe, ĝi estas nia bona amiko kiu donas al ni sanon, vigecon kaj forton — kondiĉe ke ni lernas kiel eble plej bone apliki la hardadon. En mala kazo ĝi povas kaŭzi al ni neripareblan damaĝon.

Dum longa sperto mi konstatis, ke la hardajn akvaj procedoj oni povas apliki sen timo, en ĉiuj aĝoj, sendepende de sekso kaj de sezono, per fluanta akvo sen antaŭe varmigi ĝin. Por tiu celo ne estas necesa speciala ejo, oni povas fari la akvaj procedojn ĉie: en ĉambro, banejo, sur korto, unuvorte tie kie estas oportune al persono konforme al la kondiĉoj.



Normale estas fari la akvajn procedojn ĉiam frumatene post vekigo. Tio estas la plej konvena momento. Rezulte de la akvaj procedoj oni ricevas plialtigitan memkonscion, vigecon dum la tuta tago.

La hardaj akvaj procedoj estas: surverŝado; duŝoj; banado en kuvo, rivero, lago aŭ maro. Sed se oni deziras laŭeble fortan hardan rezulton, estas necese sekvi regulojn: konstanteco kaj sistemeco.

La plej ordinara akva procedo, aplikebla por ĉiu homo, estas la **frotado**, kiu povas daŭri, laŭ la rezisteco de la organismo, de unu ĝis unu kaj duona monatoj (se oni komencas la hardadon dum la malvarmaj monatoj), sekvata de surverŝado kaj banado en kuvo, rivero aŭ maro. La frotadon oni faras per fluanta malvarma akvo en mano aŭ tuko. Antaŭ komenci la procedon oni devas varmigi la korpon per 10minutaj korp-ekzercoj kaj tuj poste komenci la akvo-procedon. Tuj post la fino oni devas energie froti la tutan korpon per viŝtuko ĝis ruĝiĝo. Poste denove devas sekvi varmigaj korp-ekzercoj.

**Surverŝado** estas procedo kun pli forta efiko, des pli ju pli longe daŭras la procedo kaj ju pli forta estas la frosta stimulo, t.e. la diferenco inter la temperaturoj de akvo kaj korpo. Surverŝadon oni faras tiel: Unue oni preparas ujon kun ĉ. 15-20 litroj da akvo. Antaŭ la procedo oni nepre devas fari 10minutajn varmigajn korp-ekzercojn. La surverŝadon oni faras per taseto, verŝante malrapide kaj frotante la malsekigitajn korpopartojn per la libera mano. Tiu procedo daŭru 2 ĝis 5 minutojn. Poste oni paŝas al energia frotado per tuko ĝis ruĝiĝo de la korpo. Post tio sekvas vestado kaj 10minutaj energiaj korp-ekzercoj.

**Banado** en riveroj, lagoj kaj maro dum la malvarmaj monatoj efikas pli forte kaj havas pli fortan hardan rezulton, ĉar oni aplikas pli fortan frostan inciton. La temperaturo de la akvo ordinare estas sub + 5° C kaj dum la vintro atingas

0° C. Vintra banado, tielnomata "**rosmarado**", estas la lasta stadio de la korphardado. Ĝi postulas pli bonan sinpreparon kaj nepran pasadon tra la jam pri-skribitaj frotado kaj surverŝado. Rosmarado efikas ekscite al la kor- kaj spiro-sistemo, al intestoj kaj ceteraj organoj, inkluzive la senduktaj glandoj, kiuj efikas favore, harde kaj kurace al la organismo.

Al banado en rivero resp. rosmarado oni devas paŝi tre atente. Antaŭe oni devas korp-ekzerco energie kaj longe por varmigi bone la korpon. Plej bone efikas kurado. Post kiam vi bone varmiĝis, eniru malrapide la akvon ĝis kolo. Mi devas averti vin, ke vi neniam eniru la akvon rapide kaj saltante, ĉar tiel vi riskus ricevi ŝokon aŭ korkrevon. Montri stultan "heroecon" povas esti fatale. Nia celo devas esti plibonigo de nia sano kaj hardado de nia korpo, por ke ni ne malsaniĝu je malvarmumo kaj infektoj.

La daŭro de la banado dependas de la temperaturo de la akvo. Ju pli malalta ĝi estas, des pli mallonga devas esti la banado. Ekzemple ĉe akvotemperaturo de 0° ĝis 10° C ne pli ol 10 minutojn. Sed pro la daŭro de akva procedo ĉiam oni devas gvidi sin per memsento. Elirinte la akvon oni devas tre energie froti la korpon ĝis ruĝiĝo, poste oni vestas sin. Ĉe rosmarado la fizikaj ekzercoj estas devigaj, ĉar la malvarmiĝo de la korpo per banado estas tre forta. Mirinde efikas denove kurado, post kiu ekestas bona varmiĝo de la korpo.

Ĉe konscia, insista kaj ĉiutaga aplikado de la hardado oni ricevas mirindajn rezultojn. Dum mallonga tempo la hardado fortigas la sanon de la praktikanto. La defendaj fortoj de la organismo kontraŭ malvarmumoj kaj infektoj plifortiĝas, la bonhumoro plialtiĝas, la laborkapablo pliboniĝas. Unuvorte: kreiĝas volplenaj, fizike fortaj kaj trankvilaj homoj.

Kiril Kalĉev, Loveĉ, Bulgario

# MEMOROJ

## Konkurso por grizuloj

La historiaj libroj estas plenaj de faktoj, datoj kaj eventoj. Sed nur malofte ili donas respondon al la demando: Kiel vivis la homoj tiutempe? Kiuj estis la ĉiutagaj zorgoj, problemoj, ĝojoj, distroj, labo-



roj, manĝoj? Jen breĉo, kiun povas plenigi vi kaj tiel konservi por postaj generacioj valorajn detalojn el la historio.

Tial MONATO apelacias al ĉiuj grizharuloj (ankaŭ kalvuloj, komprenoble!) skribi siajn memorojn. Ni estas certaj, ke ili estos minimume same legindaj kiel la memoroj de usona eksprezidanto Nixon [Niksn] kaj aliaj eminentuloj.

La plej bonaj verkoj aperos en MONATO. Komprenoble ni pagos por ĉiu publikigita verko honorarion. Do ek al la laboro! Kondiĉo: nur tajpitaj manuskriptoj estas akceptataj; se vi mem ne posedas skribmaŝinon, vi certe trovos amikon aŭ konaton, kiu helpos vin.

Limdato ne ekzistas, ĉar jen temas pri konstanta "konkurso"; kaj vi ne estu urĝata. Certe vi klopodos, ne skribi (longan) romanon, sed (koncizan) raporton. Ankaŭ interesa epizodo jam povas havi ŝancon, aperi en MONATO.

Kiu estos la unua aŭtoro? Skribu sub la rubriko "memoroj" al la redakcio de MONATO, S. Maul, Holbeinstraße 11, D-7970 Leutkirch, FR Germanio.



**La Skribmaŝino.**

Tiel skribisto de la Amsterdamanoj mi volas rakonti  
 ion pri la skribmaŝino, ĉar mi laboradas tage kun la maŝino kun  
 honoro.

La skribmaŝino estas belega ilo. Ŝi povas manĝi ĉiun malfermitan  
 en la tuta vivo: Puzintan semajnon tial, mi aĉetis ankoraŭ tian  
 maŝinon. Ŝi estas malsultekosta, ĉar mia ĉefa ne povis  
 uzi ĝin pli longe en la oficejo. Ses gvidenoj ne estas multe da roza  
 ĉu ne? Kvankam nur unu tipstango ne funkcias nun t.e. la libro  
 Z-o de Soldato. Du, mi usas la E-on, tio estas malgranda  
 diferenco. Mi esperas, ke la aliaj stangoj ade funkcias, sed  
 la aparato estas sufiĉe malmova .....

Bedaŭrinde, nun ĉesax ankoraŭ ha E-o de Hiconado. Venio estas  
 farebla pri tio, ĉar nenio estas perfekte.

Do, mi ŝojas vere, ĉar mi havas tiel facilan hepbiron, kun  
 kiu estas eble fari pli rapide heterojn kaj raportojn.

Tiel skribisto oni volu kiel eble ŝveji multe. Kaj,....

Ĉieho ! tie nun manĝar ak mi ha G-on de Caponio. Mi devas  
 -mi bone kontroli ĉi tiun ĉi maŝinon, ĉar tiel estas ne plu  
 facile por skribado. Maŝinog extra por ha komferte de ha  
 kaj ne por ha indigno. mi devas nun defrigi ha rakonton.....

Somono, nun foriras ankoraŭ ha E-o de Lemio.

Mi ekpensas, ke ha maŝino ne estas tiel bona, sed nek gvidemog umboraŝ.  
 ne estas multe da sono, kvankam mi ekhokeregas nun. Prafine, ĉi estas  
 tamen malfacila ! Iam mi havas gas kiel heterojn, kiog ne funkcias. Mi foras  
 tian ĉi kiel eble plej rapide, ĉar nun ankoraŭ ha E-o de ĉi tiu kaj ĉi tiu  
 kaj ha E-o de ĉi tiu kaj ĉi tiu forfahis.

Mi ĉetox ĉi en fonoĝon, bedaŭrinde pri ha ses gvidemog. Kaj ĉi horeni  
 Memis aĉetu skribmaŝinog tiel malsultekostog, kiel mi foras!

*Ĉi tiu leteron plenan de malespero ni ricevis de Ildo Fonso. Ni forte esperas ke vi komprenas lian averton en la lasta frazo.*



*Pardonu, sinjoro, ĉu vi hazarde havas en la valizo salon kaj pipron ?*



*"Ne, mi vere ne kontraŭas naturajn kurac-metodojn. Sed ĉu vi vere kredas ke tiel vi torpelos mian kor-atakon? Per via plata piedo?"*

**POLITIKISTOJ**

Politikistoj disdonu laŭeble ofte kaj multe aŭtografojn, ĉar dumtempe ili ne povas subskribi aliajn dokumentojn.

Li estas perfekta politikisto: Per duhora parolado li kapablas konvinki pri ĉio ajn ĉiun homon, eĉ sin mem.

**NEPLENA NEILUSTRITA VORTARO**

- aŭtografo = moderna aristokrato
- kavaliro = itala inflacio
- islamo = pasinta invalideco
- kurioza = vatikana aspekto
- titano = jugoslavia partimembro
- UEA = oscedvokaloj
- monopolo = riĉa orienteŭropano
- infanterio = ludejo
- intimo = eco de samseksulo

**Skoto estas skoto**

Skoto rakontas al sia amiko: "Imagu, hieraŭ, post dudek jaroj de silentado, anoncis sin perletere mia frato el Aŭstralio!" "Kaj kion li skribas?" "Tion mi ne scias. Li forgesis surglui poŝtmarkon, tiel ke mi devis rifuzi akcepton de la letero ..."

M.G.



# Mallonga vojaĝo al Brazilo

de Bernard Golden



Stanisław Kowalski ĉiam revis pri vojaĝoj eksterlanden. Li ne estis brila lernanto en la mezlernejo – fakte, oni opiniis lin maldiligenta – sed li ĉiam ricevis eminentajn notojn en unu lernobjekto: la geografio. Li ne nur parkerigis la enhavon de siaj geografiaj lernolibroj, sed ankaŭ avide tralegis ĉiujn vojaĝmagazinojn kaj librojn, kiuj trafis en liajn manojn. Filmoj kaj televidprogramoj pri fremdaj landoj sorĉis la 17-jaran junulon. Li ne kapablis enkapigi la bazajn faktojn pri la historio aŭ solvi la plej simplajn matematikajn problemojn, sed li sciis, kie troviĝas ĉiuj foraj landoj en la mondo kaj povis rakonti plendetale pri iliaj urboj, natura ĉirkaŭmedio, popoloj kaj industrioj.

Pasintan semajnon la mondo preskaŭ falis ĉirkaŭ Stanisław, ĉar li estis informita, ke oni ne akceptos lin en la marista altlernejo. La junulo anko-

raŭ ne komencis pensi pri alia laboro, sed nur sencele pasigis la tagojn ĉe la marbordo apud la haveno de Gdynia, kie li povis rigardi la vendadon kaj iradon de ŝipoj en la Gdanska Golfo. Li bone konis la buntajn flagojn, ne nur de la diversaj nacioj, sed ankaŭ de la ŝipkompanioj, kaj leginte la nomon de la registrorurbo sur la ŝipŝelo, li facile povis diveni, kiujn varojn la kargoŝipo liveras, kaj per kiuj produktajoj oni ŝarĝos ĝin por la vojaĝo hejmlanden.

Iun brilan sunplenan tagon, frumate ne vagante apud la doko, li ekvidis ŝipon, el kiu la ŝipanoj elŝarĝis grandajn pezajn sakojn. Ekrigardante la flagon, li eksciis, ke la ŝipo estas brazila, do li konkludis, ke la sakoj certe enhavas kafon. Brazilo – kafo – Onklo Tadeusz. Per asociado de ideoj li memoris pri la plej aĝa frato de sia patrino, kiu antaŭ 40 jaroj

elmigris al Sudameriko kaj per ŝvitiga laboro kaj ruza negocado sukcesis fariĝi la posedanto de granda kafoplantejo. Onklo Tadeusz ofte skribis al la familianoj en Pollando kaj sendis multajn fotografajojn. Stanisław ĉiam deziris sekvi la paŝojn de Onklo Tadeusz, kiun li ege estimis, kvankam li neniam havis la okazon koni lin persone. Kaj Onklo Tadeusz, informita pri la interesiĝo de la knabo rilate malproksimajn landojn kaj popolojn, skribis apartajn leterojn al li kaj sendis belajn bildkartojn el la tuta Sudameriko.

Stanisław jetis rigardon al la pobo de la ŝipo. Sur rustiganta fono estis legeblaj la blankaj literoj de la nomoj "Rio Branco – Santos". "Ho!" li ekscitite diris al si. "tiu ŝipo venas el la ĉefhaveno de la ŝtato São Paulo, kie loĝas Onklo Tadeusz. Kiel bone estus labori kiel maristo kaj havi la eblon reiri kun tiu ŝipo kaj renkont-



iĝi kun Onklo Tadeusz." Sed rigardante la brunajn kaj nigrajn vizaĝojn de la viroj, kiuj elŝarĝis la 60-kilogramojn pezajn kafosakojn, Stanisław malgaje konstatis, ke sur tiu ŝipo la ŝipanaro estas brazila, ne pola. Enpensigante, la junulo komencis formi aŭdacan planon: se li nur povus dungigi kiel havenlaboristo, eble li trovus okazon kaŝe enŝipiĝi ...

Interrompis lian revadon la zumado de aŭtomobilo, kiu kun ŝrika bremsado abrupte haltis antaŭ la pordego de la kajo. La literoj CD sur la numerplato de la luksa Mercedes-Benz indikis al Stanisław, ke ĝi estas veturilo de diplomato, kaj li konjektis, ke oni veturigis ĝin tien ĉi nun por perŝipi ĝin reen al Brazilo. Elaŭtiginte, la ŝoforo rapide alpaŝis al la pordega gardisto kaj enmanigis al li kelkajn paperojn. Traleginte kaj stampinte ilin, la gardisto iris kun la ŝoforo paroli kun la stivada maato.

Fulmorapide la plano skizita en la kapo de la junulo prenis konkretan formon. Li tuj kuris al la aŭto, momente ŝirmata de la rigardo de la gardisto kaj la ŝoforo per monteto da kafosakoj. Malferminte la ankoraŭ ne ŝlositan pordon, Stanisław saltis en la postan parton de la aŭto kaj kaŝis sin sur la planko, tirante sur sin amason da gazetoj kaj magazinoj, kiujn li trovis sur la sidloko. Baldaŭ la veturilo estis lokita sub kargobumo, kiu levis kaj demetis ĝin en la holdon. Ĝi estis la lasta ŝarĝaĵo, kaj la stivistoj fermis la ferdekan klapon, lasante Stanisław en mallumo.

Post duonhoru li sentis la vibradon de la ŝipmotoro. "Ek al Brazilo!" li laŭtvoĉe kriis, gratulante sin pro la sukcesplena ekirigo de sia vojaĝo. Li malfermis fenestreton de la aŭto kaj senĝene komencis fumi cigaredojn, unu post alia ĝisstumpe, tute ne konscia pri la ruĝlitera tabulo sur la vando antaŭ si strikte malpermesanta la fumadon. Per la flagranta lumo de la alumetoj, li konstatis, ke la ŝoforo forgesis forpreni la ŝlosilojn de la instrumentpanelo. Li eklumigis la internajn lampetojn, ŝaltis la radion kaj komencis trarigardi la magazinojn. Kelkaj kun fotoj de nudulinoj absorbis lin dum iom da tempo, ĝis lia stomako atentigis lin pri alia apetito. Sed baldaŭ la milda balanciĝo de la ŝipo lule endormigis la junulon.

... ..

Stanisław estis subite vekita per forta skuado, kaj malfermante siajn okulojn, li vidis, ke la aŭto jam forlasis la holdon kaj, tenata de la levbumo, ŝvebas alte en la aero. "Kio okazas?" li ekscitiginte ekkriis, nun tute vekiginta. "Kial oni elŝarĝas la aŭton nun? En kiu haveno ni estas?" Li rigardis sian horloĝon. Nur kelkaj horoj forpasis post lia enŝipiĝo. Sed li ne havis tempon pludemandi sin. Tuj kiam la veturilo atingis la nivelon de la ferdeko kaj estis banata en la blindluma posttagmeza sunlumo, li plongis sub la dissternitajn gazetfoliojn. Sur la kajo kelkaj dokistoj malligis la hokŝnurojn kaj puŝis la aŭton al la ŝarĝdeponeja zono. Stanisław, timante resti en la aŭto, kiu verŝajne jam finis sian vojaĝon, nevidite elŝteligis kaj kaŝis sin malantaŭ vico da benzintamburoj. Tiam li vidis, ke la samaj dokistoj revenis kaj grumblante ŝovis la aŭton al la ŝipo. "Sterkaj stultuloj!" sakris Stanisław. "Ili erare elŝarĝis ĝin. Ĝi ja devas iri al Brazilo." La junulo nun tute konsternigis, ĉar jam ne estis ebleco reatingi lian kaŝlokon en la veturilo, kaj li ne vidis alian manieron denove iri surŝipen.

"Sed kie je la diablo mi estas?" li demandis, ĉirkaŭrigardante. Li vidis grandan havenon similan al multaj aliaj en la mondo. Vico da ŝipoj kuŝis ĉe la kajo, kaj apud ili svarmis dokistoj kaj ŝarĝistoj. Aliaj laboristoj promenis, ripozis aŭ manĝis. Naztiklaj aromoj venantaj el manĝaj-kiosko, kie oni fritis kolbasojn, allogis lin al tiu direkto. Apud la kiosko aro da laboristoj staris ĉe alta tablo, manĝante kolbasojn kun pano kaj trinkante bieron. Ili parolis germane. "Do estas germana haveno, sed kiu?" Stanisław streĉis sian memoron pri la geografio de la Balta Maro. Unu el la laboristoj legis gazeton, kaj Stanisław kaŝrigardis super lia ŝultro: *Ostseezeitung* – Rostock. "Do mi estas en Rostock. Tiu urbo ja ne estis en mia vojaĝplano. Kion fari nun?"

Orelsurdiga kriĉo de ŝipa fajfilaro sonis, kaj la ĉefo de la ŝipo urĝis ĉiujn finmanĝi kaj iri al la apuda ŝipo, kiu ĵus signalis. La junulo ankoraŭ staris antaŭ la kiosko, kiam la dokistoj foriris, kaj vidante, ke ili forlasis manĝaĵojn, li kolektis la restantajn panpecojn kaj kolbasojn, kune kun tri aŭ kvar ankoraŭ ne malplenaj boteloj da biero, kaj

voreme satigis sin. Kun plena stomako, li reakiris sian aplombon kaj komencis pensi pri la daŭrigo de sia vojaĝo, kvankam la efiko de la biero iom ĝenis lian cerbumadon.

La plej vigla agado estis ĉe *L'Aurore*, franca ŝipo, kies hejmhaveno estas Le Havre. Oni komencis ŝarĝi la ŝipon, kaj Stanisław estis altirita al ĝi kvazaŭ najlo al magneto. Surkaje staris granda remork-kamiono, kaj el ĝi ŝarĝistoj portis surŝultre kestojn kaj skatolojn sur paŝponteton, kiu eniris la holdon tra pordo ĉe la mal-supro de la ŝipŝelo. La junulo rigardis atente la rutinan iradon de la ŝarĝistoj kaj tuj elpensis novan planon. Rezigante provizore la vojaĝon al Brazilo, li decidis fari etapon en Francio. Ankaŭ tie en Normandio estas parencoj por viziti.

Li alproksimiĝis al la kamiono kune kun kelkaj aliaj dokistoj. Laboristo en la malantaŭo de la remorko disdonis la skatolojn, kaj Stanisław, envicigante kun la aliaj, ricevis la sian. Surŝultriginte la pezan ŝarĝon, li ŝanceligante portis ĝin en la holdon. Tie stivisto fingromontris, kie oni devas stakigi ilin, kaj la junulo sekvis la aliajn. Liberiginte sin de la skatolo, li rapide ĉirkaŭrigardis kaj trovis malplenan spacon inter la stivtrabaro. Tie li restis ĝis la fino de la ŝarĝado. Kiam la dokistoj kaj stivistoj foriris, li komencis esplori la ŝipon kaj post kelkminuta serĉado en la labirinto de pasejoj kaj koridoroj, li hazarde trovis la manĝaj-provizejon. Kuŝigante sur kelkaj sakoj da faruno en malluma angulo, li atendis la ekiron de la ŝipo. La kuiristo plurfoje envenis por akiri manĝaĵojn, sed ne konstatis, ke kaŝvojaĝanto estas lia gasto.

Dum trenŝipo tiris la kargoŝipon tra la havena ŝanelo, Stanisław ridklukis laŭte. "Maren! Nun vere komenciĝas la granda aventuro." Li sentis sin tre bonŝanca, ĉar li sukcesis dufoje enŝipiĝi kaj ekvojaĝi sen mono, sen biletoj, sen vizo kaj sen pasporto. "Kia vivo!" Kun eĉ pli granda apetito ol antaŭe, la junulo regalis sin per luksa vespermanĝo akompanita de botelo da ruĝa vino. Kiam ĉesis la gluglado de la malpleniĝinta botelo, aŭdiĝis la ronkado de la ridetanta memfida junulo, kiu komencis sonĝi pri novaj aventuroj en Francio.

... ..



Vespere en la komandejo, la ŝipestro enmanigis dosieron al la ĉefmaato kaj ordonis: "Jen la rostokaj dokumentoj. Nun pretigu la polajn manifestojn. Ni endokiĝos en Gdynia morgaŭ frumatene."

FINO

B. Tomado

## KANTO PRI LA AMO

Cirkaŭprenoj, ardaĵoj kaj  
de arbaro belornamaj;  
kaj alvenas la turkisa maj',  
ora tempo de la am'.

Torentetoj gaje kuras nun,  
ĉie, ĉie sur la ter',  
kaj briletas, kaj murmuradas, dum  
lago stagnas de river'.

Kaj je flustro de folia ar'  
estis dolĉe kisi ŝin;  
Ni – feliĉa kaj ebria par',  
pro la amo, ne pro vin'.

Amikino mia, koro vi,  
dolĉa revo kaj sufer',  
la feliĉo kaj angoro vi,  
malfeliĉo kaj esper',

kie estas, kion faras nun?  
Ĉu mi restis en memor'?  
Aŭ alia eble karas nun,  
kaj rigardas kun ador'?

Ĉu vin amas, aŭ ne amas li,  
ĉu pasio, aŭ la ŝlim'?  
Kion, kion do proklamas ĝi,  
via koro al anim'?

Riveretoj tutsekiĝis jam,  
kaj ekflavas foliar'.  
Sed por mi ja ne sufiĉis am',  
kaj de kisoj la nektar'.

Kaj susuras milda vento plu  
en arbara bonodor',  
kaj teneras firmamenta blu',  
kaj batadas mia kor'.

kaj denove tra rigard' al sin'  
mi penetras per anim';  
feliĉigos ĉu hazardo min?  
Ĉu la amo, aŭ la ŝlim'?

## HOBIO DE L' MONATO

# Braceletoj, broĉoj, kolieroj kaj aliaj ornamaĵoj el fruktoj

Neniu ino estas tiel bela, ke ŝi ne ŝatus ankoraŭ plibeligi sin per ornamaĵoj. Sed ne ĉiu viro estas milionulo, por donaci al sia amatino aŭ edzino altvalorajn juvelojn. Kaj se infano volas donaci al sia panjo ornamaĵon, apenaŭ fonto por plenumi tian deziron povas esti juvel-butiko.

Sed rigardu nur en la naturon kaj vi vidos, ke jen estas tute senkosta juvel-butiko – vi nur devas ioniete streĉi vian fantazion. Ĉie en la mondo ekzistas fruktoj kaj nuksoj, kiuj liveras la krudmaterialon por produkti vere ravajn ornamaĵojn. Malgrandaj

kompreneble centre) la necesajn tratuojn. Nun vi devas konservi la materialon per verniso, kiu krome donas al ĝi belan brilon. Por tion bone fari, prenu maldikan trikilon kaj metu sur ĝin la fruktojn. Tiel vi senprobleme povas kaj laki kaj sekigi ilin. Uzu malgrandan, molan penikon por ne meti tro multe da verniso.

Nun prenu maldikajn sed fortikajn fadenojn de natura koloro kaj tiru fadenon tra ĉiu nukso aŭ kerno, farante nodon inter ĉiuj fruktoj. Kiel vi vidas sur la bildo, uzante ekzemple kokoserojn, vi devas unuope nodi



Ekzemploj de simplaj ornamaĵoj el naturaj produktoj: Koliero el pecoj de kokosŝelo – broĉo el poluritaj nuksoj – braceleto el perlfarmaj kernoj aŭ nuksoj, dukolore lakitaj

nuksoj kun siaj apartaj formoj kaj kernoj de fruktoj (de maizo kaj kukurbo ĝis pruno kaj kokoso) tre bone taŭgas por braceletoj, kolieroj kaj broĉoj kun natura beleco.

Kernojn de fruktoj kiel pruno k.s. oni devas antaŭe kuir kaj zorgeme purigi per dentbrosilo. Se vi volas uzi ŝelon de kokoso, unue segu grandajn pecojn kaj bone glatigu ilin per fajlilo kaj sablo-papero. Poste segu la unuopajn partetojn laŭ mem inventitaj formoj kaj rondigu per fajlilo la segegojn.

Per maldika borilo nun metu sur la ĝustaj lokoj (ĉe perlfarmaj fruktoj

ilin kun la fadeno portanta la tutan kolieron aŭ braceleton. Se vi volas produkti plurĉenan braceleton, kiun montras la alia bildo, vi devas nodi la du eksterajn ĉenojn per fadenpecoj tiritaj tra la mezaj nuksoj. Cetere sur ĉi tiu bildo la nuksoj estas dukolore lakitaj, sed tion ni konsilas nur, se temas pri nuksoj kun simpla formo kaj nebela koloro. La broĉo montras alian eblecon: Ili estas fiksitaj je drato tiritaj tra la truoj. La pinglo (aĉeteblo en kudro-butiko) estas gluita je peco de kokoso.

Do multan plezuron! Ĉu vi jam scias, al kiu vi donacos la ornamaĵon?



# ŜARADOJ

Per mi ĉio komenciĝas, per mi ĉio finiĝas; sen mi, la tero estus nur malgranda fragmento; tamen mi estas nur la vosto de rato. – Kiu litero estas?

★

Mia unua parto estas estro de romkatolikoj; mia dua parto estas parteto de tutaĵo; ambaŭ kune mi estas necesa substanco ĉiutage uzata.

★


Mia unua signifas: erare, malbone, maltrafe farita aŭ komprenita; mia dua estas la komuna loĝejo de ĉiuj homoj; ambaŭ kune: vi ne povas kompreni min.

★


Mia unua estas interpunkcia signo (radikvorto); mia dua estas la ago iri tra aŭ preter iu loko por atingi alian; dank' al ambaŭ kune, navigistoj kaj vojaĝantoj neniam erarvagas.

SOLVOJ de la ŝaradoj: ĉio = tut, vorto kiu komenciĝas kaj finiĝas per litero t; sen t la tero estus ero; la vorto rat' finiĝas per t – la serĉata litero do estas t.  
Papero (papo, ero), Mistero (mis, tero), Kompasso (kom, paso).

## Solvo de la krucenigmo en SEMAJNO n-ro nul



Kial la ĉasisto tiel miras pri sia predo? Se vi ligas per seninterrompa linio la ciferojn 1 ĝis 33, poste la ciferojn 33 kun 1 kaj fine la literojn A, B kaj C, vi mem vidos, kion la ĉasisto pafkaptis.



1  
2  
3  
4  
5  
6  
7

## Kompletiga enigmo

Metu la difinitajn vortojn horizontale en la kestetojn. Se vi ĝuste solvas, en la unuaj kestetoj vertikale (de supre) aperas nomo de kalendara periodo.

1. firma, konfidinda;
2. plilongigi ĉiudirekten;
3. metala honoriga disko stampita ambaŭflanke;
4. averti iun ke li ne faru ion;
5. multekosta ŝtono;
6. aristokrata persono;
7. plibeligi.



Saluton kaj bonvenon al vi knabino aŭ knabo, kiu scivole trafolumas tiun ĉi gazeton, kiun patro, patrino aŭ instruisto pruntedonis al vi. Mi estas Margret Brandenburg, patrino de tri plenkreskaj infanoj kaj eĉ jam bopatrino. Nia familio loĝas en malgranda komunumo en la nordokcidenta parto de la F. R. Germanio, proksime al la nederlanda limo. La domo staras en granda ĝardeno kaj la fruktarboj, kiuj ĉirkaŭas ĝin, estas daŭra tento por la lernejoj infanoj. Ili vizitas la elementan lernejon ĉe la alia stratfino kaj survoje tien ili volonte gustumas, ĉu la pomoj jam estas maturaj kaj la piroj sufiĉe dolĉaj ĉi-jare. Domage, ke vi ĉiuj loĝas tiom dise kaj for de ni, alie vi povus kunmanĝi. Venontfoje mi rakontos pri la legomoj, floroj kaj fruktoj kiuj kreskas en nia ĝardeno. Eble vi konstatos, ke ĉe vi kreskas tute samspecaj aŭ eble tute aliaj



verdajoj. Ni estas scivolaj legi pri tio. Prenu nur kuraĝe skribilon kaj surpaperigu kiel vi vivas. Vi rajtas ankaŭ desegni ion, se vi kapablas. Sendu al: Margret Brandenburg, Brinker Damm 24, D-4404 Telgte 2

ĉar mia mastro volas mortpafi min. Li diris, ke mi por nenio plu taŭgas. Miaj okuloj estas preskaŭ blindaj kaj miaj lastaj dentoj eĉ ne plu tenas kaptitan leporon. Sed kial mi mortu? Nur ĉar mi estas maljuna?" "Ne mortu! Venu kun mi! Ni fariĝu urbaj muzikistoj. Tio plezurigos nin kaj la civitanojn de Bremen." Ambaŭ kuraĝe ekiris kaj survoje ankoraŭ kunvenigis nigran katon kaj iom senpluman virkokon. La kato ne plu povis kapti musojn kaj la virkokon atendis terura sorto. Ĝin la kamparano volis kuiri en la dimanĉa supo. La kvaropo iom provmuzikis kaj opiniis tion vere bonsona.

Do, ili daŭrigis la vojon tra densa arbaro. "Mi estas morte laca, mi eĉ ne plu scias, kiu piedo povas nun ripozi," diris Kaptu, kiu jam dum longa tempo iris tri piede kaj levis dume la kvaran. "Kaj kiel mi procedu?" kverelis Kikeriko. "Se ni ne paŭzos, ni tute ne atingos Bremen." "Do, ni serĉu taŭgan lokon por dormi," decidis Grizulo kaj ĝi ekkuŝis sub densa fago kun Kaptu apud si.

## La urb muzikistoj de Bremen

"Sendankaj estas la homoj," pensis maljuna azeno, kiu dum multaj jaroj brave portis la faruno-sakojn de granda muelejo. Sed pro la aĝo ĝi pli kaj pli rapide laciĝis kaj nun ĝia mastro cerbumadis kiel malhavi ĝin, por aĉeti junan, fortan posteulon. Grizulo ne volis atendi sian malbonan sorton. Prefere ĝi kolektu ĉiujn restintajn fortojn kaj ekmarŝu direkton Bremen. Pri tiu nordgermana urbo ĝi jam ofte aŭdis kaj laste ĝi eksciis, ke tie oni serĉas urbajn muzikistojn, jen laboro por kiu ĝi sentis sin sufiĉe forta ankoraŭ. Ĝi ekiris kaj post mallonga tempo renkontis maljunan ĉashundon, kiu anhelante kuŝis sur la vojo. "Mi nomiĝas Kaptu, mi devis forkuri,





Mola, la katino, grimpis en la branĉaron kaj Kikeriko flugis sur la pinton. Sed kion ĝi vidis tie? "Lumo! Mi vidas lumon. Ni rigardu, ĉu ni tie ne povas pli komforte dormi kaj eble eĉ ekzistas io por manĝi." La aliaj konsentis kaj la kvaropo ekiris. Ili alvenis ĉe malgranda ligna domo kaj Grizulo inspekte rigardis tra la fenestro internen. Sed rapide ĝi retiris la kapon. "Ho ve! Tia obstaklo! Ili estas ĵus kalkulantaj monerojn kaj ĉie kuŝas rabajo. Mi kredas tiun domon rabista nesto kaj ĉiuj rabistoj estas hejme. Kion fari?" "Ni forpelu ilin, ni estas ja kvaropo." Kuraĝe Kikeriko longigis sian kolon. Nun Grizulo larĝkrure starigis sin, Kaptu saltis sur ĝian dorson, sur ĝin Mola kaj fine Kikeriko, kiu kvazaŭ kronis la tuton. Grizulo ordonis: "Ek!" kaj samtempe ili tiel laŭte blekis, bojis, miaŭis kaj kriis, ke la rabistaro eksaltis terurigite kaj fulmrapide malaperis en la arbaro. "Tion ni bone faris," diris Grizulo, "nun ni manĝu kaj trinku kion la ulaĉoj lasis." Sataj kaj lacaj ili serĉis dormlokon kaj baldaŭ nur aŭdiĝis paca ronkado.

Sed la rabistoj ne volis definitive rezigni pri bona vespermanĝo kaj varma lito kaj la plej kuraĝa iris esplori la domon. Kaŝe li eniris la kuirejon, kie la kato kuŝis ĉe la varma forno. Ĝiaj okuloj lumis en malhelo kiel ardantaj karboj kaj la rabisto prenis alumeton por ree bruligi ilin al varmiga fajro. Sed la kato furioze gratis lin per la piedoj. Li kuris el la ĉambro kaj falis trans la hundon, kiu mordis lin en la tibion, kaj la azeno frapis lin per la kruro. Dume kriis la virkoko per plej laŭta voĉo: "Kokeriko, kokerik'!" Senspira alvenis la rabisto ĉe sia bando kaj apenaŭ povis eligi: "Terura sorĉisto estas en la domo. Li disgratis mian vizaĝon, pikis min en la gambon kaj batis min per dika klabo. Sur la tegmento sidas krome policisto kiu vokas, Kaptu lin! Tien ni ne povas reiri." Ili tuj forlasis la regionon kaj oni neniam revidis ilin.

Niaj kvar kunuloj finripozis kaj tiam daŭrigis la marŝon al Bremen, kie la urbestro bonvenigis ilin antaŭ la urbodomo. Kiel urbaj muzikistoj ili deĵoris ankoraŭ dum multaj jaroj kaj se vi volas vidi ilin, veturu al Bremen! Apud la urbodomo staras sur Grizulo Kaptu, Mola kaj Kikeriko ĉiam forpelantaj malbonulojn.

**Ni ridu kune**

"Kiom da jaroj vi havas, knabeto?"  
 "Ses, sinjorino." "Ne eble, nur ses-jara kaj jam tiel terure malpura!"

Petro luktas kontraŭ alia knabo. Subite li krias: "Ĉesu! Ne estas juste. Vi staras multe pli proksime al mi, ol mi al vi."

"Ĉu vi aŭdis la tondron ĉi-nokte?"  
 "Ne, ĉu fakte tonbris?" "Jes, fortege." "Kial do vi ne vekis min? Ĉu vi ne scias, ke mi ne povas dormi dum fulmotondro?"

**Ne timu, via lango ne tordiĝos**

Ne ploru plorema plorulo pro propra plezuro. (Por denove ridi necesas dekfoja ripeto.)

**Kion oni ludas en januaro?**

Neĝulojn fari kaj jeti al instruisto! Per glitŝuoj kaj sledo gliti sur glacio kaj neĝo! Tiel sendube respondas infanoj en norda Eŭropo.

Naĝi en la maro! Veli per boato, plumpilkon ludi ĉe la strando! Simile respondas infanoj en Novzelando aŭ Aŭstralio. Ĉu ekzistas la samaj laŭsezonaĵoj ĉie sur la mondo? Ĉu vi jam mem eltrovis ludon, kiun eble Brita en Svedio aŭ Jan en Nederlando ankaŭ povus lerni?

Ludoj estos grava temo dum la venontaj monatoj en MONATO. Pri meminventita vintra ludo mi rakontos sur nia februara paĝo. Kiu scias ludon por marto?

## La aventuroj de Grafo Logo kaj Kukumeto

de Philippe Luez





# Kio estas Hare Kriŝna?

Kelkloke en Usono kaj Eŭropo ili estis leĝe persekutataj pro bruado kaj trafikgena konduto. En Usono okazis, ke t.n. "deprogramantoj" aŭ "cerbolavantoj" homrabis junajn aliĝintojn sub la preteksto, ke tiuj jam estas psikologie rabitaj. En Germanio okazis kontraŭ ili longa proceso, kies kerna problemo ŝajnas esti ke oni pro manko de precedencaj kazoj ne certe scias, kiel klasifiki la movadon de Hare Kriŝna: Ĉu ĝi estas religia kongregacio, bonfara organizaĵo, komerca entrepreno aŭ kio?

En eŭropaj kaj amerikaj urboj ili frape kontrastiĝas disde la ĉirkaŭa medio. La virinoj portas buntajn sariojn kaj la viroj sin kovras per safrane flavaj ŝtofoj. Escepte de unu longa maldika harbuklo kalvas la viraj kapoj. La vizaĝoj feliĉe radias kaj la bruo de ilia kantado estas konsiderinda.

De kelkaj la tielnoma Hare-Kriŝna-movado estas konsiderata nova religio, sed tia ĝi certe ne estas. Ĝi stabile sin bazas sur antikva hindua fundamento kaj apartenas al la vaiŝnavisma branĉo de la hinduismo kaj havas sennombrajn anojn en Hindujo. (La vorto vaiŝnavismo estas pluformaĵo de Viŝnu, nomo de la adorata dio.)

Tian karakteron, kian ĝi nun havas, ĝi ricevis dum sama epoko, kiam la reformacio fermentis en Eŭropo. Tiam en Bengalio vivis Kriŝna Ĉaitanja (1486-1533), kiu tiel same kolektis homojn por senĉesa glorado de dio per kantado, dancado kaj alispecaj aktivecoj. Ne senkaŭze iu epitetis la movadon "hindua savarneo". Ĝi estis siatempe reago kontraŭ religiaj sektismo kaj formalismo kaj kontraŭ la monisma doktrino de Ŝankara, kiu antaŭe klopodis

supervenki la budhismon per ties propraj rimedoj. La religia aktiveco de Ĉaitanja estis elirpunkto de granda antaŭensvingo de la bengalaj literaturo kaj kulturo kaj ĝia efiko ankoraŭ postvibras en la poemoj de Rabindranat Takur.

La Hare-Kriŝna-tradicio sin firme tenas al la hindua sistemo de sinsekvaj guroj (spiritaj gvidantoj), kiuj de generacio al generacio transdonas la instruojn taŭge interpretataj por novaj sociaj cirkonstancoj. Ŝajnas ke la unua guro, kiu strebis transplanti vaiŝnavismon al okcidento, estis Baktivinoda Takur (1838-1914), kiu krom guro estis ankaŭ juĝisto.

Sed nur la alveno al Novjorko de Baktivedanta Prabupada (1896-1977)



donis videblan rezulton. Kiam li en 1965 entreprenis sian vojaĝon al Usono, li estis jam 69jara kaj havis post si ordinaran laborvicon kiel direktoro de kemia industrio. Laŭdire li kunportis al Usono nur sep dolarojn, muzikinstrumentojn kaj kelkajn librojn. Sidiĝinte sur razeno de iu parko en Manhattan li ekkantis kaj ne bezonis longe atendi antaŭ ol komencis kolektiĝi sindediĉemaj gejunuloj ĉirkaŭ li.

Dum la sekvantaj dek du jaroj la movado rapide disvastiĝis tra la mondo. En Anglio kvarono de Beatles [bit'lz], nome George Harrison [gorĝ heris'n], fariĝis simpatianto kaj apoganto. Laŭ la nombro de inicitoj la movado ne gigantas: 5000 personoj estas nombro menciata. Des pli granda estas la aktiveco. 108 centroj estas establita ĉirkaŭmonde, inter ili kelkaj lernejoj kaj 14 bienoj. La Hare-Kriŝnanoj havas eksplicitan preferon al simpla terkultura ekonomio, alproksimiĝo al naturo kaj al la tezo "etskale estas bele". Vera bazo de la aktivado estas libro-eldonado kaj -vendado.

Kerno de la instruo estas: Servu al dio! Kion ajn vi faras, ĝin faru donace al dio! Ĉio alia ordiĝas ĉirkaŭ tiu centra motivo. Ĉe siaj disĉiploj Baktivedanta insistis pri kvar rigoraj sinbridoj: eviti seksajn aktivecojn, kiuj ne celas koncipon; eviti manĝadon de viando, fiŝoj kaj ovo; eviti monhazardajn ludojn; eviti kafon, teon, tabakon kaj ebriigajn substancojn.

Hare-Kriŝnanoj renkontas diversajn malfacilaĵojn klopodante asimili siajn aktivecojn al eŭrop-usonaj juro kaj kulturo. Preskaŭ ĉiam gepatroj tute ne komprenas siajn gefilojn aliĝintajn al la movado kaj insultas ĝin ke infanoj fremdiĝas de la familio.

Bertil Nilsson

*Ĉu vi havas spertojn pri Hare Kriŝna aŭ similaj religiaj grupoj? Kion vi pensas pri ili? Kial vi ne aliĝus al tia grupo? Aŭ ĉu vi povas imagi, fariĝi grupano? Skribu pri ĉi tiu temo al la redakcio de MONATO (S. Maul, Holbeinstr. 11, D-7970 Leutkirch)*



**AZIO**

# Kien iras Afganio?

Post preskaŭ kvindek jaroj da izolo, dum kiuj fremlandano nur povis enveturi la landon dank' al speciala permeso de la reĝo mem, ekde 1964 Afganio malfermiĝis. Eble tro rapide. La ĉefurbo Kabul ankaŭ tro rapide kreskis, same kiel la tri aliaj grandaj urboj: Herat, Kandahar, Mazar-e Ŝarif. Nur Majmena eskapis el la trograndiĝo pro malhavo de modernaj ŝoseoj. La negocema burĝaro puŝis la reĝon (Zaher Ŝah II) al la rompado de la izolo.

Sovetianoj kaj usonanoj estis pretaj "helpi" la evoluiĝantan landon. Kial Sovetio interesiĝas al Afganio, ni bone scias, ĉar ĝi ne ŝanĝis sian politikon de la fino de la 19-a jarcento. La cara Rusujo jam volis ekhavi liberan vojon "al la varmaj maroj". Al tio, nun aldon-



iĝas la sovetia volo izoli Ĉinion, kaj forigi la islaman ideologion de la landlimoj de la Respublikoj Turkmena, Uzbeka kaj Taĝika. Usono nur anstataŭas Brition kaj celas la gardadon de la araba nafto kaj de la Araba Maro.

La reĝo provis uzi baskulpolitikon, do usonanoj kaj sovetianoj konstruis la traafganiajn aŭtoŝoseojn, ne kune, sed ĉiu sian duonparton. Tra la vundo de Islam-Kala, doganposteno, de nun influis la landon komercistoj, turistoj, ideoj:



*Strato La Kiaban en Herat, kie pluraj homoj estis mortigitaj dum la ribelado de la urbo en marto 1979*



iraniaj, sovetiaj, pakistanaĵ, eŭropaj, usonanaĵ. La elito edukigis en franclingvaj lernejoj en Kabul, kie en la izolejo de la grandaj hoteloj, meze de la kosmopolita sfero, la unuaj afganinoj ekformetis la "ĉador"-on, la ĝispiedan, saksimilan vualon, kaj ekmalkaŝis la vizaĝojn kiujn ĝis nun nur patro aŭ edzo rajtis vidi. La religiema popolo ekskandaligis. La duonnudaj turistinoj helpis la pliiĝantan malŝaton de la "moderneco". Prezoj kaj ankaŭ riĉoj daŭre kreskadis. La tribhomoj konsternis ekternis ke "tiom valoras homo, kiom sia mono". Ĝis nun povon, kapablecon, moŝtecon donis Dio, de nun monposedo. Sed jam la mulaoj predikis kontraŭ la reĝimo. 9 jaroj sufiĉis al la monarkio por perdi sian forton, 9 jaroj da kontakto.

### La unua puĉo

En junio 1973, dum la forestado de la reĝo vojaĝanta en Italio, lia moŝta kuzo, Mohamed Daud Ĥan, ekpuĉis. La puĉon ebligis la kadroj de la agfana aerarmeo instruistaj, same kiel Daud Ĥan, en Sovetio. Do komencis la kutima nereakta interveno: 1e formi fidelan eliton per instruado en ia nacia lingvo (ĉi tie, ruse); 2e malstabiligi la reĝimon uzante la progresemon de la instruita elito kaj starigi dum kelkaj jaroj provizoran registaron; 3e forigi per nova puĉo (ĉe sovetianoj ĉi lasta nomiĝas "revolucio") la mezan registaron kaj anstataŭigi ĝin per ideologie tre firme trejnita kadroj. Ĉiuj eroj de la meza registaro estas devige mortigitaj per eviti internan opozicion.

### Dua puĉo (nacia revolucio)

Sekve, la 27an de marto 1978, post dutaga "revolucio" far kolonelo Abdul Kadir, Daŭd Ĥan kaj lia familio estis mortigitaj, kaj Mohamad Taraki, unua sekretario de la popola Demokrata Partio (P.D.-P., "Ĥalk") ekprenas la povon. Li organizas la landon laŭ sovetia maniero kaj eliminis la anojn de "Parŝam" (Standardo), alia revolucia partio, kiu multe helpis por likvidado de la eksa reĝimo. La lando restis kvieta, la plimulto ne-

niam taksis alte Daud Ĥan-on, ĉu ĉar li perfidis sian reĝan kuzon do la leĝojn de la triba lojaleco; ĉu ĉar li nur perceptigis kiel estro de la puŝtua gento; ĉu ĉar liaj urbaj kaj modernaj aferoj ŝajnis sen-



*Ne estas facile aĉeti kaj pagi portante "ĉadoron" (vualon) kiel la virino supre. Ĉu la knabino sur la suba foto povos vivi sen vualo? La registaro propagandas tiajn reformojn.*

graveco al nomadoj kaj kamparanoj. En la historio de la lando luktoj kaj murdoj de gravaj personoj estas tre oftaj kaj la popolo eklernis zorgi nur pri siaj aferoj.

### Reformoj tro drastaj

Sed la Taraki-reĝimo ne kontentigis per la ŝajna povo en Kabul. Taraki, sovetistila marksisto, sincere volis transformi la landon el feŭda, superstiĉa, postĝinta tribejo en modernan ŝtaton. Por fari tion li uzis drastan metodon, preskribitan jam en 1927 de Maŭ Zedong en la "Raporto pri esplorado de kamparana movado en Hunan". Klerigado de la popolo estas sendube grava kaj urĝa tasko en la lando. Sed la junaj urbaj instruistoj, kun revolveringo banta ilian femuron, estis fremduloj en la vilaĝo. Ili alportis urban kulturon: "La tekstoj uzataj en la kamparaj elementaj lernejoj tute temis pri urbaj aferoj kaj ne konformis al kamparaj bezonoj. Krome, la sinteno de la instruistoj de la elementaj lernejoj al la kamparanoj estis tre malbona kaj, anstataŭ esti helpantoj de la kamparanoj, ili fariĝis homoj abomenindaj por la kamparanoj" (Maŭ Zedong, 1927!). La kamparanoj jen fortranĉis nazon kaj orelojn de instruisto, jen skurĝe forpelis lin, jen torture mortigis lin.

La registaro respondis per sendado de soldatoj el la nova ruĝa armeo kaj per terura subpremo. La vilaĝo Ŝunkri estis ĝisgrunde detruita, 25 infanoj kaj virinoj estis mortigitaj. Ne la viroj, ĉar ili estis kun siaj fusiloj en la montaroj. La tuta tribo "Ŝafi" ekleviĝis kaj ĝia kontraŭatako kostis al la armeo 1000 fusilojn, du tankojn kaj oni ne scias kiom da mortintoj.

La deviga klerigado de la virinoj kontraŭstaras la islamajn vivprincipojn. Por la marksistoj de la nova reĝimo la religio nur estas "opio de la popolo", sed Maŭ Zedong, kiu bone konis la popolon, diris ke en la lukto kontraŭ la superstiĉon, oni nur devas "tiri la arkon sen pafi, nur indiki la movon". La popolo mem devus forlasi la religion, oni nepre ne devas



turmenti la amason kaj detruai laŭ decentraj ordonoj relegiajn konstruaĵojn aŭ mortigi pastrojn.

La Taraki-reĝimo ne kapablis kompreni tion. Ĝi volis tro rapide perforti la progreson, do ĝi provokis la kontraŭstaron de la religiemuloj. La Ĥalki-oj bone lernis la sovetian lecionon, sed forgesis ke Islamo ne estas eklezio "aliancita kun la ekspluatanta klaso", kaj ke la religiaj ĉefoj reale havas la konfidon de la homoj, estas tre proksimaj al ili. Kompreneble, la religiaj ĉefoj eksentis kiel devon direkti kaj protekti la fidelulojn kontraŭ la "sendia, urba, fremda subpremo". Sed la porsovetia reĝimo konas nur perforton kiel metodon. La religia ĉefo Mohamed Ibrahim Muĵadedei estis "likvidita" kun la tuta familio en januaro 1979, alia ĉefo Miagul Ĵan en marto. Ribeligo popola ekflamiĝas en Herat en la sama momento. La islama fido estas en danĝero kaj neevitebla venas: la religia milito ("ĝihad") estas deklarita, ĉiu bona muzulmano de nun devas doni sian vivon por protekti la fidon: "nur Alaho estas granda" ("alah-o-aĥbar"). Sed la nova reĝimo per la

#### **Agrara reformo**

donis po 6 hektaroj da agro al la kamparanoj. Ĉu ili pliŝatas agron aŭ religion? Plejparte ili taksas la fidon super ĉio, la aliaj seniluziĝas, ĉar por kultivi la teron mankas akvo, grajno, iloj kaj la tria helpo. Ili ankaŭ timas akcepti la teron, kiun "la ĥalkioj forŝtelis de aliuloj", ĉar ankaŭ la islamaj leĝoj punadas riceladon. Aldone, laŭ sovetiaj metodoj, la registaro devigas ilin formi kooperativojn. Do, ili eble ne atakos la novan reĝimon, sed neniam prenos armilojn por kontraŭbatali la 'moŝtajn puŝtulojn', la 'danĝerajn hazaratojn' aŭ la 'soldatojn de la Fido'.

#### **Rezistmilito**

Dumtempe la rezistmilito organiziĝas kaj la irana sukceso donas al ĝi potencan esperon. La plej grandaj rezistantaj organizaĵoj (Islama Partio; Islama Ligo; Islama Movado; Porliberiga

Fronto de Afganio; la Fulmotondro; la Venko, k.t.p.) unuiĝas en la 'sankta milito' kaj alprenas la nomon: Ĵurinta Batalantaro por Islamo (Teiman-Atahad-Islami). La kvar plej grandaj eldonis komunan deklaron: "La religiema popolo afgana neniam akceptis ĉi tiun ne-islamano reĝimon... Ni decidiĝis por starigi registaron fonditan sur la Korano kaj la islama vivmaniero. Ni daŭrigos la lukton ĝis fina venko".

Rapide Kabul nur kontroladas la ŝoseojn (ne sufiĉe por ke fremdaj turistoj — ekzemple ses germanoj la 9an de septembro — ne estis mortigitaj), kaj la urbojn. La centra montaro (Hazarajat) kaj la provincoj apud la pakistana landlimo (Badaĥŝan, Konarha, Nangarhar, Paktia) estas kontrolataj de la ribelantaj triboj. En oktobro 1979 ribelantoj eĉ petis la eksan reĝon, Zaher Ŝah II, reveni al Afganio, ne kiel reĝo sed kiel tradicia muzulmana tribestro.

#### **Tria puĉo**

Fronte al malorganizita ribelado la registaro manifestas neniam unuecon. Male, ĝi aspektas tre malunueca kaj senleĝa. Dum foresto de prezidento Taraki, ĉefministro Hafizulah Amin, pri kiu Taraki

diris: "ni estas kiel ungo kaj fingro", ekprenis la povon, kaj anoncis ke prezidento Taraki pro hipertensio demisiis. La reveninta eksprezidento kredeble volis organizi reziston, ĉar li havis fidelajn amikojn en la komandantaro de la armeo. Inter 14a kaj 17a de septembro en la stratbataloj falis 50-60 soldatoj kaj eksprezidento Taraki estis mortigita. Laŭkutime en la reĝimo oni ankaŭ mortigas la familion por eviti postan opozicion, sed la familio de Taraki forlasis Afganion (cetere kun la familio de Amin) al Sovetio en junio. Laŭŝajne eĉ sovetianoj surpriziĝis pri la ekago de prezidento Amin, sed post duontaga intervidiĝo inter la sovetia ambasadoro kaj la nova estro, Sovetio daŭre helpas la novan reĝimon.

#### **La afgana armeo**

Amin cetere multe bezonas helpon. La reĝimo apogas sin sur la Partio P.D.P. kaj la armeo.

Ambaŭ estas malorganizitaj kaj timigitaj pro la 'purigoj' plenaj da sango kaj torturado. Sen la armeo, meze en neklera afgana popolo, la partio neniom valoras kaj la armeo ne plu estas fidinda. Por la soldatoj, la altaj salajroj, la



*Virinoj en Mazar-E-Ŝarif uzas la servojn de la publika skribisto. 85% el la loĝantaro estas analfabetoj.*



ĉiutaga viandomaĝo kaj la privilegioj ne sufiĉas, ĉar laŭdevene ili ankaŭ estas muzulmanoj kaj triboj. Facile uzeblaj kontraŭ fremdlandanoj ili malbone akceptas pafi al la 'soldatoj de la Fido' kaj la homoj de siaj triboj. Tamen ĉi tiu armeo estas sufiĉe granda: ĉ. 120 000 viroj bonege trejnita de sovetiaj konsilantoj kaj moderne armitaj. La vundopunkto estas psikologia. La homoj ne kapablas kompreni la neceson de la reformoj, kaj ili sentas sin 'malbonaj', 'kulpaj', des pli ke la rimedoj uzataj de la reĝimo estas teruraj: torturado, enkarcerigado, ĉantaĝo per familianoj, ekzekutado, ktp. Do, kiam ilia animo estas tuŝita per familianaj ploroj, aŭ per religiaj paroladoj, la soldatoj ekribelas, kiel, en Jalabad en aprilo, aŭ kiel en la kazerno Bala-Hisar en Kabul mem en oktobro. La reĝimo dronigis en sangon la du ribeladojn. Sed la soldatoj mem, kiuj devige mortigis kamaradojn, poste bedaŭras la fratomurdon, kaj ofte aliĝas al la ribeluloj, homoj de siaj triboj, kiujn ili ne kapablas koncepti kiel malamikojn. Tiamaniere brigado de la 7a kirasdivizio, mortiginte la sovetiajn konsilantojn, aliĝis al la 'malamikoj' en majo.

Malgraŭ centoj da konsilantoj sovetiaj mortigitaj, Sovetio daŭre helpas prezidenton Amin, same kiel ĝi helpis prezidenton Taraki. Sur la aerodromo de Kandahar oni vidis pli ol cent Mig-aviadilojn. Post la ribelado de Herat, Sovetio tuj sendis 25 batal-helikopterojn M 24. Prezidento Amin opinias ke la registaro sukcesos se ĝi uzas sufiĉe krude la perforton. Laŭ informo de Internacia Amnestio, pli ol 12 000 homoj estas en malliberejoj en Afganio. En la malliberejo de Pol-i-Ŝarki, apud Kabul, ĉiunokte oni mortpafas 20 ĝis 30 homojn. De la komenco ĉ. 3 000 estintus ekzekutitaj. En oktobro 1979 la gerilanoj atakis la karcerojn de Gardez, ĉefurbo de Paktia: sole el tiu ĉi karcero ili liberigis 720 enŝlositojn, kaj revenis en la 'tribajn areojn' de Pakistano, sian elirbazon.

### Kio okazos?

La estro de Pakistano, generalo Zia ul Hak, preparas en sia lando novan 'islaman' konstitucion. Kompreneble li ne estas malamiko de la 'soldatoj de la Fido', sed zorge li evitas malfacilaĵojn kun Sovetio. Ĉinio esprimas simpatian por la ribelantoj, akuzas Sovetion "ekpreni mem la komandon de la afgana armeo", sed tute ne helpas. Iranio havas ankaŭ simpatian sed ĝi ne kapablas helpi kaj ankaŭ timas Sovetion. Usono ne intencas fari ion, ĝi akceptis la mortigon de sia ambasadoro Dubs preskaŭ sen protesto. Ĉu ĝi interŝanĝis kontraŭ Egiptio kaj la arabaj naftokampoj la 'vojon al la varmaj maroj'?

Analizistoj rajtas opinii tiel. Se ĉi tiu kaŝa intenco ekzistas, kialoj ne mankas por timi nek al Iranio, nek al Pakistano, kaj oni povas antaŭvidi malstabiligajn provojn en Baluĉistano kaj daŭrajn malordojn en Irano.


Eŭgeno de Zilah

(En dua artikolo la aŭtoro detale priskribos popolojn, historion kaj evoluon de Afganio.)

### AŬTOMOBILO

## Kiel ŝpari benzinon?

La lastaj plialtigoj de la petrolprezoj trafis Eŭropon iom neatendite per sia amplekso. Kvankam aŭtomobiloj ne konsumas pli ol kvinonon de la naftimportado de eŭropaj industriaj landoj (t.e. multe malpli ol la nepre bezonata vintra hejtado), preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo klopodas malaltigi benzinkonsumadon per diversaj rimedoj. Aŭto-industrio estas gravega branĉo en multaj landoj (Francio, Italio, Germanio) kaj samtempe aŭtomobiloj tiel intime partoprenas nian ĉiutagan vivon, ke oni ne povas serioze deziri malkreskon aŭ malaperon de aŭtoproduktado. Nepras do ŝpari benzinon ebligante privatan aŭto-trafikon. La aŭto-produktantoj klopodas, eble iom malfrue, konstrui iom pli ŝparemajn modelojn. Dizel-aŭtoj ebligas malpli grandan konsumon ol klasikaj benzinatoroj. Dizel-oleo estas relative malmultekosta kaj ĝuas en multaj landoj impostajn avantaĝojn. Grandaj aŭto-firmoj aldonis dizel-modelojn al sia produktado. Fiat ofertas nun 3 dizel-modelojn;



Eksplodantaj prezoj kaj stagnema produktado — tiel sensuna kaj plennuba aperas la nova ekonomia jaro laŭ la prognozoj de konjunktur-esploristoj en la okcidenta hemisfero. Precipe por la plej potenca ekonomia lando, Usono, la jaro 1980 estos malbona. Kvankam oni taksas la kreskon de l'produktado je 1,5%, ankaŭ nula kresko ne surprizus. Des pli malagrabla estas, ke la inflacio en Usono atingos supozeble 9%. La prognozoj por la eŭropaj landoj estas ĝenerale iomete pl favoraj, tamen ankaŭ pli malbonaj kompare al la pasinta jaro.



Volkswagen kreis novan dizel-motoron por sia mezklasa modelo Golf. Renault prezentis la R 20 kun dizel-motoro. La usona aŭto-industrio ofertas por krompago dizel-motoron al multaj modeloj. Dizel-aŭtoj tamen ne estigas nur avantaĝojn. Inter la diversaj malavantaĝoj oni povas mencii la altajn fabrikadkostojn, la multekostegan prizorgadon.

Alia solvo estas malaltigi la benzinkonsumon de klasikaj

la bezonatan elekton. Tiu sistemo devus ŝparigi 50% de la konsumo de klasika aŭto.

Konstatinda estas krome tendenco al uzado de komputeroj. Instrumentpanela komputero donas al la aŭtisto informojn pri la konsumo kaj meza rapideco, ebligante tutcerte sufiĉe multe ŝpari. Komputeroj ankaŭ anstataŭos kurent-distribulojn.

Hidrogena motoro estas esplorata i.a. en Japanio de la firmo Suzuki.



*Dizel-Golf — ĉu mirakla solvo?*

motoroj. Oni do klopodas produkti malpli pezajn aŭtojn, aldoni kvinan rapidumon aŭ plilongigi la kvaran. La principo estas simpla: la motoro malpli rapide turniĝas kiam la veturilo same rapidas, kio ebligas malpli altan konsumon.

Kelkaj firmoj klopodas produkti motorojn, kiuj ne bezonas brulaĵon kun alta oktannombro. Tiu-direkten paŝis plej malproksimen la germana firmo VW; Soveta Unio produktas eĉ novan Moskviĉ-modelon, kiu funkcias per malaltoktana benzino.

Elektraj aŭtoj ŝajnas tre racia solvo, sed bedaŭrinde ne eblas stoki elektron grandkvante, kaj ili ne povas trairi pli ol kelkajn dekojn da kilometroj. La franca firmo Elf-Aquitaine [Akiten] klopodas tamen konstrui elektran motoron, kiu ne bezonos stoki elektron. Klasika benzinmotoreto turnos generatoron, kiu produktos

Ĝi nuntempe estas neinteresa: ĝi bezonas nome 15 litrojn por 100 km. La nunaj kostoj de litro da hidrogeno estas 5 dolaroj!

Gasaj motoroj ne postulas tre multekostan adaptan, sed gaso ne troviĝas grandkvante en Eŭropo, kaj ĝia amasa uzado dependigus plejparte de importado; tio povus okazigi la samajn malfacilaĵojn kiel petrolo.

La aŭto-industrio do klopodas konstrui ŝpamodelojn, sed la nuna stato de la teknika evoluo ne ebligas pli ol 25% ŝpari post du aŭ tri jaroj. Ĉar necesas tuj ŝpari, kiel eble plej multe, la ŝtataj instancoj en multaj landoj malaltigis la leĝe permesitan rapidecon jam al 80 kmh (i.a. Nederlando, Danio, GDR, Hungario). La nunaj cirkonstancoj ŝajnas postuli pli da ŝparemo de la aŭtistoj mem ol de la veturiloj. Ĉu la aŭtotekniko malebligos en baldaŭa estonto pliajn malagrabaĵojn?

R. Pontnau

## KOLUMNNO DE LEGANTOJ

Se vi sendas al ni gajan foton (kun mallonga teksto) aŭ limerikon aŭ ridigan preseraron (ne rigidan!) eltonditan kaj MONATO ĉi-loke publikigas ĝin, **vi ricevos 10,- gmk!**



*"Permesu ke mi iom ventumu min. Ankaŭ esperantisto ja estas nur ordinara homo. Uf, kiom varmege!"*

Slavomir Ruszkiewicz, Pollando

## LIMERIKOJ

Mi konas ĉaseman Afganon.  
Li luis arbaran kabanon  
por ĉasi putorojn,  
fazanojn, leporojn ...

Ĝis nun li ne kaptis eĉ ranon!

A. Lienhardt, Francio

Virino plendis al najbaro  
pri geedza lit-amaro:

"Li ne plu voluptas."

"Ĉe alia adultas",

diris najbaro eble sen eraro.

G. Hofstätter, Aŭstrio

Vizitis turist' Tel-Avivon.  
Ignoris li mem la motivon.  
Kaj li multon supozis,  
je la fin' diagnozis:

"Bezonas mi aperitivon!"

R. Ŝulco, Germanio



## Hometoj ne rajtas je vivo

Dirante la supran oni riskas trovi en sia leterkesto koverton kun fekaĵo aŭ renkonti agreseman personeton kiu minacas la vivon. Iomete tiel spertis Randy Newman [Rendi Njuman] kiam lia popkanto "Short People" (Hometoj) havis sukceson ĉe la granda publiko. En Nederlando ĝi dum iom da tempo aperis en la furorlistoj. Sed malgraŭ persona prezentado en televida programo 'Top Pop' la sukceso restis limigita. Ĉu, ĉar la teksto, la muziko, la ludado estas respektive tro mokema, tro komplika, tro originala por plaĉi al la neplenkreska menso de la meza spektanto, kiu kaprice diktatoras la televidajn programojn? Randy Newman ŝajnas sendependa, mokema spirito, kaj estante malproksima de la mezo, li mem eble povis imagi la malŝat-on kiun suferas homo kiu diverĝas de la sendanĝera mezeco:

Hometoj ne / ne rajtas (3×)  
je viv.  
Kun mal/granda man  
kaj etokul  
tamen grandas li  
kiel mensogul.  
Kun mal/granda nazo  
kaj eta etdentar,  
portas platform-ŝuojn  
per nanaĉa piedpar.

Nu mi / ne volas hometojn (3×)  
ap'd mi.  
Hometoj ne malsimil-  
as vin kaj min.  
(Stultul kiel mi)  
Ĉiuj ja fratoj estas  
ĝis vivofin.  
(Stas miriga ĉi mond)

Hometoj sen / kunulas (3×)  
por am.  
Pro malgranda gamb  
rekt el Liliput  
necesas levi lin  
nure por salut.  
Lia nana ĉar  
hupas hep, hep, hep.  
Lia eta voĉ  
sonas pep, pep, pep.

Kaj kun / malpuretaj fingroj  
kaj putra fi-inklin  
ripete ili  
trompas vin.  
Nu mi / ne volas hometojn (3×)  
ap'd mi.

Tiom sendependa pensulo estas la poza maldiligentisto Randy Newman, ke li igas Einstein fuĝi el Germanio en 1905 anstataŭ 1934. La stilo de Randy multe pruntis de la tradicia bluso kaj bugi-wugi. Karakteriza estas la obstino en la pianoparto, kelkloke, kaj ankaŭ la longaj instrumentecaj alternaĵoj inter la kantaj frazoj. La taktoj estas senkaprice regulaj. Kompare kun liaj fruaj verkoj, en la pli freŝdataj diskoj Little Criminals (Krimetuloj) kaj Born Again (Renaskita) Newman aplikas pli kuraĝajn melodiojn kaj kelkfoje brute malglatajn per-instrumentigojn apud la tradiciaj pecoj. Restis la portretoj, la skizoj, la scenetoj, la maloftaj amkantoj. La ĉi-kunaj tradukoj estas el Little Criminals. Por tute aprezi ilin oni nepre devus aŭskulti la diskon, ĉar la muziko kaj la voĉa prezento necesas por vivigi la tekston, kiu cetere en la traduko suferas pro tio ke oni

### DOKUMENTO DE L'MONATO

Yehudi Menuhin, violinisto mondfama, ricevis la pac-premion 1979 de la germana libro-borso. Okaze de akcepto de la premio, li diris en sia parolado i.a.:

Sed hodiaŭ ni bedaŭrinde denove estas devigataj memori ke strebado je potenco kaj riĉo, ĉu individua, ĉu kolektiva, se ne limigita per pli altaj valoroj — kio postulas multan forton, multan moralan kaj korpan kuraĝon — tro ofte kondukas al malkontento, korupto kaj milito. Kaj ni nun en nia neekstermebla egoismo al ĉio ĉi aldonis pluan dimension: En nesuperebla cinikismo ni konsumadas niajn naturajn elementojn, aeron, akvon, humon, vegetalaron kaj animalaron de kiuj dependas ĉio viva. Kiel entute ni hodiaŭ povas paroli pri paco en tia disŝirita kaj dispartigita, sanganta kaj kruela mondo?

La teoria diskutado ĉi-tema portas trajtojn de hipokriteco — nia senhelpeco nur fariĝas des pli granda kaj turmenta per la disvastigado de socioj en gazetaro, radio kaj televido; kaj ĉi-maniere la nova malsano multobliĝas kiel ĉiuj antaŭaj epidemioj kaj preskaŭ lamiĝas eĉ la plej fortan volon; man-en-mane kun tiu ĉi nediferencigita kaj senkunteksta informaro estiĝas en la kreskantaj sendirektaj amasoj la tutampleksa fremdiĝo de la vera individua homa estaĵo devigata vivi en niaj grandurboj sub kondiĉoj de izoliteco kaj torturo, ĉu konkreta, ĉu en spirita kaj psikologia sencoj. Tiuj ĉi homoj,

de kiuj forrabiĝis idealoj kaj celoj promesantaj kontenton, estas devigataj serĉadi anstataŭajn idealojn, falsajn celojn kaj danĝerajn kamaradojn.

Jen do nia lukto, nia batalo je paco — paco, ne kiel pasiva nocio kiu signifus la deklaron de rezigno je la propra volo antaŭ tia eksceso da misuzataj valoroj, da pervertitaj lojalecoj, da venĝo paradanta kiel morala soldateco, da teroro kiel maskaĉo de kuraĝo. Ni ĉiuj devas fari nian plejeban por haltigi ĉi tiun timindan karikaturon de heroiginta monstro. De unu teroristaro al la alia la homa estaĵo estas senkonscie misuzata, ĝiaj lojaleco, vizikapablo, sindonemo kaj forto premataj per klinikeca malvarmo kaj diabla ruzeco en la servon de iu potencavida dominantaro.

trad. Gerald Tucker



transiras de lingvo kun mez-nombre dusilabaj vortoj al alia kun trisilabaj. Por kompensi tion oni bezonas oftan elizion.

NEEBLE MISTIFIKI LA DIKULON  
(You can't fool the Fat Man)

Kun la fibankiero  
bierotrinkis mi.  
Ĉiujn belulinojn  
postrigardis li.

Li kraĉadis teren,  
strabis pro la sun,  
salutante homojn  
ĉiu jen kaj nun.

Diris mi: "Konsideru, Dikul,  
mi honestas nun.  
Ĉu pro unu eraro  
ĉiam restu pun?"

Frato militservas,  
en malliber fratin.  
Por ŝin elaĉeti  
pruntu dudekkvin!"

Diris li: "Mi maldormas, kara!  
Pura fantazi!  
Hipokritulaĉo  
ĉiam restos vi.

Ne, neeble kara,  
mistifiki min.  
Hipokritulaĉo,  
fiku la patrin!"

Randy Newman kreas muzikon kiu laŭ-instrumente (gitaroj, perkutilaro) multe similas la popstilon, sed ĝi havas nivelon kiu multe superas la junhoman inklinon por trabeĉi la silenton. Komparu la furoraĵon "Unu por mi, unu por vi" (infinite ripetu) de La Bionda kun la skizo pri grandurba malespero:

BALTIMOR

Flugu for, meveto  
de marmorŝtupar,  
esplorante ĉion,  
serĉe por la mar.

Penoj en l'amaso  
en havena urb.  
Kie trovi ŝirmon?  
Ĉie nur uzurp.

Platulin atendas  
por la klientar.  
Ebriul sub pluvo  
dormas sur trotuar.


Oni la vizaĝon  
ŝirmas per la man,  
de la urb mortanta  
sen kompren human.

Oh, Baltimor,  
estas pen nura viv, nura viv.

Prenu franjon Sani,  
prenu fraton Roj.  
Per la tendoĉaro  
iru ni sur voj.

Vivi en kamparo  
apud la montar,  
por ne plu reveni  
antaŭ mortojar.

Oni kutimiĝis ĝui kantadon sen kompreno de ĝia teksto, eĉ preferas la anglajn pop-kanzonojn por ne aŭdi la banalecon de la tekstoj. Pli subtila estas efiko se oni komprenas la vortojn sen precize kompreni la pensojn. Tiu-speca efiko kontribuas multe al la mistereco de "In Germany before the war" kombine kun la nostalgia samtempa uzo de minora kaj maĵora modaloj.



ANTAŬ MILIT EN GERMANI

Antaŭ milit en Germani  
vivadis vir kun nostalgi.  
En jar mil naŭcent tridek tri  
en Dusseldorf.

Kaj tage je la sama hor  
tra park al Rejn li iras for  
por sidi sen labor.

Mi vidas la riveron  
sed mi pensas pri la mar,  
pensas pri la mar —  
Mi vidas la riveron  
sed mi pensas pri la mar.

La vojon perdis blondulin  
okul el griz, harar el lim.  
Spegulis liaj vitroj dum  
li rigardis ŝin.

La vojon perdis blondulin  
okul el griz, harar el lin.

Ni kuŝas sub aŭtuna ĉiel,  
ŝi meze en orbukla bel.  
Ŝi kuŝas tute sen mov.

Aĉetu la diskon. Vi trovos aliajn miniaturojn, kiel tiujn pri la knabeto kiu ekstazas pri la polica parado, aŭ la maljuna farmulo kiu klopodas paciĝi kun la vivo per soleca ebriiĝo inter la porkoj. Bonhazarde la anglaj tekstoj ĉiuj troviĝas sur la disk-koverta, ĉar sen ĝi fremdulo malmulte kaptus eĉ se lerninta la anglo-amerikan. Amuzu vin per kunkantado de la silab-fidelaj tradukoj. La komplika ritmo de Baltimor defios vin.

Rob Vetter

Randy Newman, *Little Criminals*.  
Warner Bros. Records K 56404  
(1977). 16,50 guldenoj en  
Nederlando.

## AŬSTRALIO

### Stranga rasismo

Socia darvinismo en tre krudaj formoj vigle manifestas sin en Aŭstralio. Servinte dum la 19a kaj frua 20a jarcentoj por pruvi rajton, eĉ devon de la 'superaj' blankaj rasoj trudi sin ĉien en la mondo, ĝi direktiĝas, kiel ĉiam, kontraŭ senpotenculoj: aŭstraliaj indiĝenoj. Tiu nigrebruna raso dum jarmiloj mirinde adaptis sin al severaj vivkondiĉoj de la kontinento, sed ĝia relative simpla teknologio ne ebligis rezisti invadon de eŭropanoj post 1788. Dank' al pafiloj, veneno, novaj malsanoj kaj la katastrofaj psikaj sekvoj ĉe ŝtonepokuloj, la blankaj prapatroj de hodiaŭaj aŭstralianoj facile konkeris preskaŭ la tutan kontinenton, sed tiu ĉapitro de la historio ne estis tre glora. Fine de la pasinta jarcento la malapero de la indiĝenoj ŝajnis neevitebla, konforme al la doktrinoj de socia darvinismo. Sed ili ne malaperis. Multaj hodiaŭaj indiĝenoj estas mikstrasuloj, sed eĉ la nombro de 'pursanguloj'



ree pligrandiĝas. Ilia nuntempa situacio multe varias laŭ geografia situo; plejmulto vegetas en antaŭurbaj kvartaloj aŭ ĉerande de kamparaj vilaĝoj. Manpleno da ili atingas materian vivnivelon egalan al tiu de blankaj burĝoj, sed oni ne povas paroli pri ĝenerala socia akcepto de ili. Kelkaj miloj da indiĝenoj ankoraŭ tenas kontakton kun sia antikva vivmaniero, kaj el ili kelkaj centoj estas 'laŭleĝaj' posedantoj de sia tradicia teritorio.



Tamen ŝajnas ke eĉ tiuj cedo al la vivbezonoj de la indiĝenoj povos baldaŭ malaperi. Post malkovro de mineraloj, precipe uranio, sub grundo 'fordonacita' al indiĝenoj, monavidaj registaroj kaj kompanioj interesiĝis pri tiuj antaŭe seninteresaj teritorioj. Estus absurde, ĉu ne, se nuraj indiĝenoj rajtus aŭ malpermesi 'evoludon' de sia grundo aŭ postuli altan tantiemon! Indiĝenoj, kiuj kontraŭis la nacian intereson aŭ mem fariĝus milionuloj — kia groteskaĵo! Sed kiel prezenti tian rasismon kaj nudan akiremon sub pli 'filozofia' vesto? Nu, al tio taŭgas socia darvinismo, kiu povas aspekti scienca. Preskaŭ ĉiuj blankuloj en Aŭstralio, ĉu konscie aŭ ne, utiligas ian formon de tiu vulgara filozofio.

Malofte tamen oni tiel sentime malkaŝas sian perversan mensostaton kiel la skribinto de letero al la nacia ĵurnalo. Sed kion li skribis, tion pli-malpli akceptas terure granda parto de la loĝantaro. Ni citu:

*... estas fundamente falsa la ideo, ke 20 000jara, kaj komplete inerta, okupado de la aŭstralia kontinento far la indiĝenoj per si mem donas al ili ian rajton posedi por ĉiam siajn antikvajn teritoriojn, kaj aparte la rajton malebligi eksplu-*

*atadon de ĉio sub aŭ sur tiuj teritorioj. Se ĝi entute ion signifis, tiu multmiljara kaj tute senfrukta okupado de la kontinento far la indiĝenoj montris ekzakte la malon: ke ili ne kapablis evoluigi la uzajn de la kontinento por la ekspansiaj celoj de la vivo kaj ke ili do, pro tiu malplenumo, perdis la rajton, kiun ili imagis posedi en ĝi. Ilia forpeliĝo el ĝi, kune kun iliaj imagitaj rajtoj, estis biologia nepraĵo. Tio ĉi ne estas morala juĝo, sed objektiva fakto, kiu sialvice baziĝas sur la fakto, kiu estas la bazo de la tutmonda biologia sistemo de post la apero de la vivo sur nia planedo. Tiu baza fakto estas ke laŭ la logiko de la evoluada procezo la vivmedioj de la mondo pasas en la superregan posedon de la specioj, genroj kaj*



*ordoj de vivaĵoj plej bone adaptiĝintaj por ekspluati siajn eblojn por fariĝi pli alte organizitaj tipoj de ekzisto.*

Nia biologo kondamnas la sintenon de la indiĝenoj, kiuj laŭ li deziras ke

*oni permesu al ili daŭre vivadi en la restantaj iluzioj de ilia senmova ŝtonepoka kulturo kaj primitivaj animismaj kredoj, kun, kompreneble, nutrado kaj defenda protekto provizitaj de la cetera aŭstralia popolo. Ili ne rajtas postuli ke ni, la ceteraj aŭstralianoj, oferu niajn vivnecesajn ekonomiajn kaj strategiajn interesojn sur la altaro de tiuj fantaziaĵoj. La leĝaro (pri rajtoj posedi tradician teritorion) bezonas ŝanĝojn en pli racian formon kiel eble plej baldaŭ.*

Fine la skribinto neis ke li estas rasisto; male, la indiĝenoj estas rasistoj. Ĝis nun, kiom ni scias, neniu samideano lia proponis ke oni solvu la problemon per mortpafado, sed ni estu paciencaj ...

Trevor Steele





## Dumviva optimisto

Ne malofte en la historio de idealismaj movadoj celantaj plibonigi diversajn aspektojn de la homa vivo aperas individuoj, kies sindediĉo kaj celkonscia venkado de ĉiuj obstakloj inspiras ankaŭ homojn ne aktive partoprenantajn en tiaj movadoj. Religiaj kaj filantropiaj organizaĵoj provizas la homaron per multaj ekzemploj, kaj la Esperanto-movado ne estas escepto. Ĝia fondinto, d-ro L.L. Zamenhof, ja estas la klasika prototipo. Post li venis tuta armeo da 'pacaj batalantoj', inter kiuj elstaras la protagonisto de *Ĉiu-Ĉiun*, Teo Jung. Nun, en la ankoraŭ hela krepusko de sia vivo, li aŭtobiografie registris kelkajn el la plej brilaj kaj ankaŭ plej sombraj momentoj de tiu vivo. Sur preskaŭ kvarcent paĝoj la sprita aŭtoro prezentas sin kvazaŭ anekdote, ĉiam bonhumore, eĉ kiam li pritraktas diversajn sortobatojn, kiuj trafis lin kaj minacis neniigi lian laboron. Kiam oni parolas pri denaskaj esperantistoj, oni ĝenerale pensas pri homoj, kiuj lernis la lingvon Esperanto en hejma ĉirkaŭmedio, kiel veran gepatran lingvon. Priskribante siajn infan- kaj knabjarojn, Teo Jung ja indikas, ke li estis denaska esperantisto eĉ antaŭ ol li lernis la lingvon, ĉar je tre frua aĝo li formulis por si pensmanieron kaj starpunkton pri interhomaj rilatoj, kiuj kongruas kun la ideologio de la esperantismo. Certe ludis fundamentan rolon la enfamilia edukado, kiu ekformis lian karakteron kaj inklinigis lin al morala taksado de homaj agoj — same kiel faris alia samaĝa sentiva knabo, Ludoviko Zamenhof, kvaronjarcenton pli frue.

Estas tute nature, do, ke Teo Jung, estante ankoraŭ adoleskanto, estis altirita al Esperanto; rapide li lernis la lingvon kaj tuj elpaŝis kiel aktiva movadano. Tio okazis en 1909-1910, kaj sendube emocie kaj intelekte ligita kun lia idealisma sinteno kiel

## Cepa supo (pariza maniero)

**10 gmk ricevas por suba recepto s-ino Marie-Christina Meisberger, Strasburgo. Ĉi tiun sumon gajnas ankaŭ vi, se vi sendas al ni recepton pri specialaĵo de via lando.**

**Skribu al nia ĉefkuiristino  
Maria Becker-Meisberger  
Alter Hangarten 2  
D-6653 Blieskastel**

Ne ĉiu bongustaĵo devas esti komplika en preparado. Feliĉe la fama franca kuirarto disponigas al ni verajn frandaĵojn tiurilate. Eĉ gekomencantoj en la kuirejo kurage povas elprovi ilin preskaŭ sen risko.

Alvenis ĉe ni du receptoj el Francio, kiujn ni prezentos al vi sinsekve pro diversaj kaŭzoj. Unuope ambaŭ povas esti delikataj antaŭmanĝoj aŭ leĝeraj vespermanĝoj, kune ili taŭgas kiel kompleta, mi pensas eĉ festa menuo, se vi aldonas deserton (ekzemple salaton el freŝaj fruktoj). Kune preparitaj ili permesas al vi energiŝpareme uzi vian bakformon.

*Bezonataj estas: 500 g da cepoj; 2 supkuleraj da butero (aŭ margareno); 1 1/4 l da buljono; 4 tranĉaĵoj da blanka pano; 1-2 ajl-bulb-eroj; salo, pipro, timiano, petroselo; 50-80 g da raspita fromaĝo (svisa); 2 supkuleraj da blanka vino (laŭvole).*

### Procedu jene:

Senŝeligu kaj ronde tranĉu la cepojn, varmigu la buteron en kaserolo kaj fritetu la cepojn ĝis kiam ili fariĝas orkoloraj, aldonu la buljo-



non kaj kuiretu je malalta varmece 15-20 minutojn. Spicu per la supre menciitaj spicoj kaj aldonu eventuale la vinon. Verŝu la supon en fajrorezistajn pelvetojn, metu sur ĉiun ujon tranĉaĵon de ĵus rostita kaj per ajlo parfumita pano, disŝutu la raspitan fromaĝon kaj metu la tuton por ĉirkaŭ 10 minutoj en la varmegan bakformon (antaŭhejtitan je 225 gradoj). Elprenu zorge, aldonu iom da freŝa, hakita petroselo kaj surtabligu ĝin tre varma.

Ĉi-tiu fama pariza supo estas rekomendinda speciale en la nuna sezono. La cepo same kiel la ajlo enhavas kvazŭ homeopatian apotekon. Ili povas anstataŭi danĝerajn medikamentojn en la senco: Antaŭzorgi estas pli bone ol kuraĉi. Ambaŭ stimulas la digeston kaj efikas kontraŭ bakterioj. La ajlo plilarĝigas la sangovazojn, malaltigas la sangopremon kaj plifortigas ĝenerale, precipe en pli alta aĝo. En certaj regionoj oni eĉ diras: Manĝu ĉiutage krudan cepon kaj vi neniam bezonas kuraciston. Sed nepre dishaku, tranĉu aŭ elpremu ĝin tuj antaŭ la uzo. Kaj ne timu la larmojn. Laboru ĉe malfermita fenestro aŭ tenu pecon da pano inter viaj dentoj kaj spiru tra la buŝo (konsilo de Johanna Shorter-Eyck: Internacia kuirlibro).





Teo Jung en sia hejmo

esperantisto estis lia tiutempa debuto kiel verkanto de poemoj en la germana lingvo. Fakte, tiu okupiĝo pri Esperanto kaj la poezio helpis lin elteni la unuton-an laboron en presejo, kiun li devis plenumi. Kiel filo de presisto kaj poste plene kvalifikita preseja metiisto, Teo Jung enradikigis en sia kapo okaze de sia esperantistiĝo la gvidideon, kiu donis direkton al lia vivo: presejo — Esperanto — periodaĵo. Tiel la 18-jarulo asociis tri nociojn, kiuj ebligis al li krei novan kaj unikan karieron; li fariĝis la redaktoro kaj eldonanto de la plej fama kaj plej vaste legata Esperanto-gazeto. La sekvaj ĉapitroj de la vivhistorio de Teo Jung apartenas ankaŭ al la historio de la Esperanta gazetaro. En 1920, laborante kun sia frato en sia propra presejo en Horrem apud Kolonjo, Germanio, li lanĉis *Esperanto Triumfonta*. Li rigardas tion la 'unua apogeo' de sia esperantista vivo, la efektivigo de revo daŭrinta tutan jardekon. En 1925 la nomo de la gazeto estis ŝanĝita al *Heroldo de Esperanto*, kaj ĝi aperis kun semajna ofteco, vera unikaĵo en la historio de la Esperanta ĵurnalismo. Kiam en 1936 la nazia reĝimo malpermesis pluan publikigon de *Heroldo*, Teo Jung, la 'eterna optimisto', ne ĉesis labori. Li transloĝiĝis al Nederlando kaj

daŭrigis la eldonadon de sia gazeto, ĝis ĝi denove estis ĉesigita de la naziaj okupantoj de Nederlando dum la dua mondmilito. Ankaŭ tiu bato estis nur provizora, kaj tuj post la milito *Heroldo* revivis kaj ankoraŭ ekzistas hodiaŭ kiel duonmonata internacia organo de la Esperanta movado, vere vivanta monumento al tiu profesia esperantisto, kiu jam fariĝis legendeca figuro.

Kiel klarigi la sukceson, kiun Teo Jung plurfoje atingis, spite al malfavoraj kondiĉoj kaj homa malbonvolo? Sur unu paĝo de lia aŭtobiografio estas substrekindaj ruĝkrajone jenaj ŝlosilaj vortoj koncize karakterizantaj lian vivon: "neŝancelebla fido, optimismo kaj adaptiĝemo". Ankaŭ Zamenhof havis tiujn trajtojn, kaj ili formas la ĉeftemon de la leciono, kiun oni lernu, legante pri la agado de Teo Jung por la ideo de Internacia Lingvo dum sep jardekoj.

*Ĉiu-Ĉiun* estas facile legebla verko kun tre persona, eĉ intima stilo. Jung ne trentiras siajn legantojn tra seka labirinto de nomoj kaj datoj, sed, kvazaŭ en la formo de epizode kunmetita aŭtobiografia romano, li rakonte revenigas el la pasinteco viglajn memorojn pri eventoj, kelkaj bagatelaj, aliaj tre gravaj, kiuj vortmozaïke portretas lin. Kaj por doni nuancrican fonon al tiu bildo, Teo Jung aldonas klarigojn pri siaj filozofiaj vidpunktoj kaj pri la motivoj, kiuj instigis lin dediĉi sian vivon al Esperanto.

Unu manko en la libro estas indekso de nomoj, lokoj kaj temoj, kiu plivalorigus la verkon por konsultaj celoj. Espereble la eldonisto aldonos ĝin al la dua eldono de *Ĉiu-Ĉiun*.

Bernard Golden

Teo Jung: *Ĉiu-Ĉiun*. Sep jardekojn en la Esperanto-movado. Memoraĵoj de 86-jara optimisto. TK-Stafeto, Antverpeno - La Laguna, 1979, 398 paĝoj, DM 31,-.

## HISTORIO

# Kie estis lando de Amazonoj?

Krom la stranga informo de antikvaj grekoj pri Atlantito estas ankaŭ ne malpli stranga sciigo pri amazonoj. Ilia lando ne estis precize montrita; ĝi estus ie en mezorienta aŭ orienta Eŭropo, kiu por grekoj tiam estis nekonata. La konata pola historiisto Henryk Łowmiański [Lovmianski] nun prezentis interesan hipotezon, ke amazonoj vivis en nuna Pollando. Pli precize: en tiu regiono de Pollando, kiu havas nomon Mazovio. Ĝuste tiu ĉi nomo jam sugestas, laŭ li, ke Mazovio estas iama Amazonio, lando de amazonoj, ĉar laŭ la sono ekzistas granda simileco inter tiuj ĉi nomoj. Des pli, ke oficiale la nomo Mazovio aperis sufiĉe malfrue, en la 11a jarcento, kaj en pli frua tempo tiu ĉi lando ne estis konata.

Sed ne nur la nomo apogas hipotezon de Łowmiański. Raraj informoj pri amazonoj aŭ ne kontraŭas ĝin, aŭ — se kontraŭas — la kontraŭo povas esti ŝajna. Antaŭ ĉio: la informoj pri amazonoj mem estas tre neprecizaj. Lando de solaj virinoj estas ja neebla, kaj ĉiujn legendojn, kiuj priskribis ĝin kiel landon de virinoj, oni povas kompreni nur kiel famo pri lando, en kiu la virinoj regas aŭ estras. En la antikva epoko kaj ankaŭ en frua Mezepoko la ideo de virina regado estis tiel stranga, almenaŭ en romia, postromia kaj en ĝermana Eŭropo, ke viroj ne povis imagi landon, en kiu ili estus regataj.

**Ĉu vi ricevis ĉi tiun kajeron senpage? Tiukaze vi tenas en viaj manoj provekzempleron. Se vi ne tuj decidis aboni, vi ne ricevos duan kajeron, ĉar pro la kostoj ni povas sendi provekzempleron nur unu fojon.**



Tial do verŝajne ili faris ŝanĝojn en la buŝe komunikata famo. Kaj komunikantoj de tiu ĉi famo estis nur viroj. Ekzemple Adam de Bremen, kiam li skribis pri la morto de episkopo Adalberto en malproksima Prusio, skribis ankaŭ pri la moroj de prusoj kaj agnoskis, ke ĝuste en Prusio vivas amazonoj, kiuj ne havas virojn kaj gravediĝas pro la uzo de speciala akvo. Adam de Bremen ne estis mem en Prusio kaj amazonojn li mem ne vidis — li nur ripetis tion, kion li aŭdis. Mazovio, tiam ankoraŭ ne konata sub tiu ĉi nomo, estis tre proksima de antikva Prusio.

Simile parolis Ibragim ibn Jakob, vivanta en la 10a jarcento. Li kiel unua bone priskribis la landojn de okcidentaj slavoj. Li referis informojn, kiujn li ricevis buŝe de romia reĝo Otto I. Laŭ la raporto de Ibragim la urbo (ne lando, sed nur urbo) de amazonoj kuŝas okcidente de lando Rus. Kion signifis la vorto Rus, nun ne estas eble precize konstati.

Pri amazonoj skribis ankaŭ Alfredo la Granda, angla reĝo vivanta en 9a jarcento. Li montris ilian landon norde de kroatoj kaj sude de lando de sarmatoj. Kaj kroatoj kaj sarmatoj ankaŭ nun ne estas precizaj nomoj.



Per kio sin vestis amazonoj (vidu supre!), ni ne scias, sed supozeble estis krudaj materialoj. Al hodiaŭaj virinoj kaj fraŭlinoj ni rekomendas ankaŭ fortikan ŝtofon, krudan drapon kun la nomo "lodeno". Jen du klasikaj modeloj: duparta loden-vestaĵo kaj lodena jupo kun bluzo el aŭstria Vorarlberg. Lodeno estas agrabla ĉar varmiga dum eŭropaj vintro, printempo kaj aŭtuno.

Vivanta en 8a jarcento Paŭlo Diakono, skribante historion de longobardoj, menciis ankaŭ pri Lamiĥ (Lamiso), la reĝo de longobardoj, kiu venkis amazonojn. La reĝo tre gloris sin pro tiu venko, kio ankaŭ estas sufiĉe stranga fakto, ĉar venko de viroj en batalo kun virinoj estis ja dubinda bazo por laŭdi sin. Sed tiam kavalira ideo ankoraŭ ne estis konata. La loko de menciita venko ne estis precize priskribita, sed laŭ ŝpuro de longobardoj ĝi devis esti ie aŭ en Prusio, aŭ eventuale pli sude de Prusio, sed tre proksime. Paŭlo Diakono aŭdis ankaŭ, ke en lia tempo estis ankoraŭ amazona enklavo ie en orienta limdato de Germanio; la orienta limo de Germanio estis sur la rivero Don.

La bavara geografo Einhard ankaŭ aludis pri amazonoj, sed neprecize. Ni aldonu ke Tacito (Publius Cornelius Tacitus — 1a jarcento) menciis pri amazonoj, en kies lando la virinoj estris, sed en tiu lando estis ankaŭ viroj. La lokon de Amazonio Tacito montris en norda parto de Eŭropo, proksime de la Balta Maro.

Ĉiuj argumentoj por la hipotezo de Łowmiański ne sufiĉas por esti certa pri ĝia ĝusteco; tamen ili estas sufiĉe sugestaj. J. Vek



## KIU ESTAS?



### portret-enigmo

Kiam li transprenis sian nunan postenon antaŭ iom ol unu jaro, tio estis vere tutmonda sensacio, ĉar ankoraŭ neniam en la preskaŭ dumiljara historio de tiu organizo iu lia samnaciono havis tian pozicion. Kvankam jam per la elekto de sia(j) nomo(j) — la alpreno de nova nomo havas longan tradicion — li esprimis, ke li intencas daŭrigi la verkon de siaj antaŭuloj, li tamen jam pruvis, ke li havas tute propran stilon, kiu igas lin tre populara kaj certe altigis la internacian prestiĝon kaj la moralan aŭtoritaton ne nur de lia personeco, sed ankaŭ de lia ofico. Dum la mallonga tempo de sia regado li jam entreprenis plurajn grandajn vojaĝojn, kiuj estis mondvasse atentitaj, kaj ĉiam lia misio estas la sama: pledi por paco kaj interkompreniĝo inter nacioj, rasoj, religioj kaj por efika helpo al la plej malriĉaj ĉie en la mondo. Cetere, li ankaŭ estas ŝtatestro.

+

Kiu estas? Skribu la nomon de ĉi tiu eminentulo sur poŝtkarton kaj sendu al la redakcio de MONATO (Stefan Maul, Holbeinstr. 11, D-7970 Leutkirch, FRGermanio) antaŭ la 15a de februaro (poŝta stampo); se estas pluraj ĝustaj solvoj, decidus lotumado pri gajnantoj de l'premioj.

1a premio: La Granda Kaldrono de John Francis.

2a premio: Tra l'Mondo (sondisko)

3a premio: Asteriks, la Gaŭlo

Gajnintoj de la lasta enigmo: 1a Lucijan Miehlić, Jugoslavio; 2a K. Kraft, Ĉeĥoslovakio; 3a Ulrich Hasecke, FRGermanio. Gratulojn! La ĝusta solvo estis: Kurt Waldheim





# De kolonio al sendependa nacio

Travivaĵoj de Edward Symoens en en Belga Kongo (nuna Zairio) kaj Ruando de 1947 ĝis 1975.

## Enkonduko

En la dek unu numeroj de la unua jarkolekto de MONATO, mi klopodos rekonstrui tra miaj propraj vivo, laboro kaj sperto la politikan, socian, ekonomian kaj precipe psikologian evoluon de koloniaj institucioj, strukturoj kaj pensmanieroj al sendependeco de Zairio (ĝis 1960 la kolonio "Belga Kongo") kaj Ruando (ĝis 1962 kuraŭtorlando estrita de Belgio). Mi ankaŭ donos miajn impresojn kaj konsiderojn pri la postsendependa periodo.

Kiel estro de grandaj lernejoj antaŭ kaj post la sendependeco, kiel sekretario kaj prezidanto de grava profesia asocio de funkciuloj, kiel membro de la komisiono por la instrureformo en Zairio de 1960 ĝis 1966, en pluraj aliaj funkcioj, pri kiuj mi parolos en la daŭro de miaj artikoloj, mi sekvis tiun evoluon de tre proksime, ofte kontaktis ministrojn (belgajn kaj afrikajn), ĉiujn ĉefguberniestrojn, eĉ la reĝon.

Temas do pri persona proksimiĝo al la problemaro; ne estas historia studo, kvankam mi garantias la absolutan kontroleblan veron de ĉiuj konkretaĵoj, citaĵoj, faktoj, datoj, okazaĵoj. Memoroj, opinioj, pripensoj, konsideroj ja estas memkompreneble subjektivaj; tio tamen ne malhelpas samtempe objektivcon. Mi nur rilatos pri mia propra vivo laŭ la mezuro kiel tio estos necesa por kompreni pli ĝeneralajn situacion, etoson, atmosferon. Personaj anekdotoj foje eksplikas pli ol longaj priskriboj.

Mi scias ke ekzistas en la mondo multaj antaŭjuĝoj kontraŭ kolonioj kaj kolonianoj. Ne ekzistas defini-

tiva vero rilate koloniajn sistemojn; ĉio dependas de la vidpunkto kiun oni okupas. Ĉar miaj personaj rilatoj kun la afrikanoj estis bonegaj, mi parolos sen iu ajn morala komplekso. Sed tio ne signifas ke mi sisteme kondamnos ĉion kio dum la kolonia periodo estis realigita; estus tro stulta kaj kontraŭa al la historia vero.

Ankoraŭ unu averto. Mi rakontos kronologie; la unuaj impresoj estos necese tre eksteraj kaj "koloniaj", skribitaj el la starpunkto de eŭropano, blankulo en...1947, kaj ne en 1979. Iom post iom ni enpenetros en la verajn enlandajn afrikajn problemojn, kaj en la lastaj artikoloj mi preskaŭ ekskluzive pritraktos tiujn. Ni neniam forgesu ke en kolonio estas kolonianoj kaj koloniigitoj; oni nepre devas paroli pri ambaŭ, ili estas intime kunligitaj.

Estas grava eraro prijuĝi pasintan epokon per hodiaŭaj kriterioj kaj valorskaloj. La historio evoluas el la pasinteco al la estanteco, kaj ne inverse. Historiaj okazintaĵoj estas la konkreta esprimo de en iu epoko regantaj konceptoj, ideoj kaj motivoj. Ni klopodos malkovri ĉi tiujn por interne kompreni kio okazis dum la kolonia periodo. Jen ni do startas en la jaro 1946.

## Kial elmigri?

Ekde 1946 mi laboris kiel mezlerneja instruisto en Bruselo. Kun mia edzino kaj kvar infanoj (6-4-3-2) mi loĝis en unu el la Bruselaj antaŭurboj, feliĉe en domo, ne en apartamento. Krom miaj instruaktivecoj, mi antaŭ kaj dum la milito per memstudado estis daŭriginta

universitatajn filologajn studojn kaj ekzameniĝis ĉe la centra ŝtata ekzamenkomisiono; mian lastan ekzamenon mi devis trapasi en septembro 1946. Pro tio mi ne estis povinta respondi al la unua alvoko de la Ministerio de Kolonioj, kiu serĉis spertajn instruistojn por la nove starigitaj ŝtatlernejoj por blankuloj en nia kolonio. Sed en la komenco de 1947, mi respondis favore al la dua alvoko, estis akceptita, plenumis en rekordtempo ĉiujn formalizaĵojn, kaj la 29an de septembro 1947 mi forflugis de Melsbroek, la tiama belga nacia flughaveno, en DC 4, la pli granda civila aviadilo (42 sidlokoj), kiu en 22 horoj ligis Belgion al ĝia kolonio en la centro de Afriko.

Flugi en tiu tempo ankoraŭ ne estis tiel kutima, ĉiutage afero kiel hodiaŭ. Du monatojn antaŭe mi ricevis mian aerbapton en Amsterdamo, en malnova Junkers el la milito, aviadilo sen apogseĝoj, sed kun sidbenkoj ambaŭflanke. Se mi rakontas tion, estas nur ĉar dum la lastaj 30 jaroj mi travivis la tutan evoluon de la moderna civila aviado.

Mia edzino ne rajtis akompani min; ŝi sekvu ŝipe kun la infanoj kelkajn semajnojn poste, sur la Steenstraete, dummilita transportŝipo, do sen ia komforto. Kiam iu tiam foriris al la kolonio, oni flustris diskrete, do ankaŭ pri mi: "Kion li ja faris ke li devas elmigri? Li ja havas bonan salajron — eĉ lia edzino instruas". Oni skuis la kapon, ne komprenante. Tiel estis la tiama atmosfero rilate al la kolonio.

Efektive, kial elmigri? Ne pro financaj motivoj mi devis fari tion, (dum la unuaj jaroj en Afriko, mi eĉ gajnis pli malmulte ol en Belgio), ne pro dummilitaj mallaŭdindaj agadoj, ne pro familiaj malfacilaĵoj, kontraŭe, ni havis ĉion por resti trankvile hejme. La motivoj ne estis tiel profundaj: malsukcesinta aĉeto de domo, infaneto mortinta, mia nehejmsidemo pro multaj kulturaj aktivecoj (almenaŭ laŭ mia edzino!). Ne, eble nur estis alvoko de la nekonato,





60 m alta akvofalo de rivero Lufina (supre) en Kiubo — La aŭtoro (kun kasko) en indiĝena vilaĝo kun fama flandra poeto Karel Jonckheere (maldekstre sidante)

laŭ la ekzemplo de mia patro kiu forlasis la hejmon, kiam li estis dek ok, por ŝipveturi tra la mondo kaj finfine resti en Usono, kie mi cetere naskiĝis en la ŝtato Texas. Do, iu moviga ĝermo en la sango?

Ĉi tiuj konsideroj estas necesaj por kompreni iomete la psikologion de koloniano: ĝenerale li estas agema, laborema aktivulo, ne tro ligita al unusola loko, unusola tasko, eble iom aventurema. Sed ankaŭ iu ĝenerale ne tro ŝatata nek aprezata de siaj samlandanoj... kvankam mi tuj aldonas ke mi mem neniam suferis de iu ajn malagrabra sinteno de iu ajn. Mi poste diros kial ne.

La 30an de septembro, post dumvoja alteriĝo en Tunizo kaj Kano (Niĝerio), ni alteriĝis en Leopoldstad (Leopold-urbo, la nuna Kinŝasa = Kinŝaso).

### Unuaj supraĵaj impresoj

La humida varmego, la peza, sufoka aero fine de la kvarmonata senpluva sezono. Oni kredus sin en vintra varmejo aŭ en saŭno; oni ŝvitas sen ia motivo; la vestoj gluiĝas al la korpo; la manoj ĉiam estas malseketaj...

Escepte la ŝoseo de la flughaveno al la apuda urbo, kiu estis makadamigita dum la milito de la Usonanoj, ĉiuj aliaj vojoj estas tervojoj, polvo-aleoj. Tiu polvo ĉien enpenetras, gluiĝas al ĉio ĝis la komenco en oktobro de la pluvsezono.

Ĉiuj domoj, escepte en la urbocentro, estas konstruitaj apartaj unu de la alia, senetaĝaj, en bangalostilo. Estas la loĝejoj de fremduloj, ĉar la urbo havas "blankan" kaj "nigran" kvartalojn.

La abunda verdaĵo, la arboj laŭlonge de ĉiuj vojoj, la domoj perditaj en la verdo.

Ĉie nigruloj, multnombre sur la stratoj, babilante, ridante, kurante, biciklante, portante ĉiuspecajn objektojn sur la kapo.

Tipa afrika odoro, miksaĵo de bruligita ligno, de ŝvito, polvo, humo, ne difinebla, ankaŭ ne malagrabra, sed forta, enpenetranta.

Ĉio estas tiel malsama, tiel stranga kaj samtempe fremda, nekutima, senhejmigita. Mi ne nur estas 5 000 kilometrojn for de mia patrujo, sed en tute alia mondo, tute alia historia epoko, sen iu ligilo kun la lando kiun mi unu tagon antaŭe forlasis. Escepte la samlandanoj kiuj atendis nin en la flughaveno.

Alveno de aviadilo estis ankoraŭ io nova, nekutima, vera okazaĵo. Antaŭ la milito ĉiuj kolonianoj ŝipveturis al Afriko, longtempe suden ĝis Kaapstad (Kaburbo) en Sud-Afriko kaj poste norden vagonare ĝis Elisabethstad, vojaĝo de pluraj monatoj! Alia vojo estis ŝipe ĝis Lobito en Portugala Angolo kaj de tie vagonare al Elisabethstad; mia edzino faros ĉi tiun lacigan vojaĝon: kvar tagojn kaj kvin noktojn kun kvar infanoj tra la dezerto...

Do, multaj homoj atendis nin, estis samtempe distro kaj sciavido, ĉar la civila telekomunikado ankoraŭ ne estis tiel bone organizita. Oni ne ĉiam sciis antaŭe kiu alvenos. La aŭtoritatuloj avide kaj senpacience atendis ĉiujn novalvenantojn por daŭrigi la interrompitan laboron kaj komenci novajn projektojn. Dum la milito, la kolonianoj ne povis returni hejmen; ili libertempis en Afriko mem, ofte en Sud-Afriko. Post la milito ili ĝuis pli longan libertempon en la patrujo, multaj ankaŭ estis mortintaj; estis tiom da manklokoj kaj tiom estas farenda!

Kiam ni forlasis Belgion, ni nur sciis ke ni flugos al Kongo kaj nur surloke oni komunikos la lokon kie ni laboros. Tiuj kiuj ŝipvojaĝis, nur eksciis tiun lokon meze de la vojaĝo, sur la ekvatoro. Tiam ne plu eblus returni hejmen, se la loko ne plaĉis al ili!

(daŭrigota)



# Kuriozaĵo en Aŭstrio: Walser-Valo

Kiu provus atingi la aŭstrian Walser-Valon [Valsa] de Aŭstrio, certe travivos surprizon: Nepasebla rokega muro stariĝis tie. Ekzistas nur du eblecoj atingi tiun valon en la aŭstria provinco Vorarlberg: aŭ transiri la altegan montaron aŭ veturi al germana teritorio kaj de tie oportune atingi ĝin. Al tiu geologia stato Walser-Valo dankas ke ĝi fariĝis ŝtatpolitika kuriozaĵo. La enloĝantoj havas aŭstriaajn pasportojn, sed la monvaloro estas germana marko kaj ne aŭstria ŝilingo. La viroj militservas en la aŭstria armeo, sed ilia patrio situas ekonomie en la najbara Germana Federacia Respubliko (GFR).

Tiu regiono situas en valo kun longeco de 15 km kaj larĝeco de tri ĝis kvar km. La alteco atingas 1 500 m. Tri valoj kuniĝas ĉe la (sola) komunumo Mittelberg. La oficistoj estas aŭstria, sed ricevas al la salajro eksterlandan aldonon de 30 procentoj. Mittelberg posedas du poŝtajn kodnumerojn: aŭstrian kaj germanan. Same ekzistas aŭstria kaj germana telefonnumeroj. La telefonaparatoj apartenas al la aŭstria poŝto, sed oni devas nutri ilin per germanaj moneroj. Leteroj kaj pakajoj estas transportataj en germanaj poŝtaj sakoj. Kompreneble oni uzas aŭstriajn poŝtmarkojn, sed oni povas aĉeti ilin nur per germana mono. Komplika estas ankaŭ la situacio rilate la militan servon. En la malgranda valo ne ekzistas kazerno. Soldatoj povus atingi kazernon en aliaj partoj de Aŭstrio nur pasante la altegan montaron, kio tute ne eblas, precipe dum vintraj monatoj. Pasi la germanan limon en aŭstria uniformoj ne estas per-



mesate, ĉar GFR estas membro de NATO, dum Aŭstrio akceptis en 1955 neŭtralecon. Pro tio aŭstria soldatoj de Walser-Valo deponas la uniformojn en alia parto de Aŭstrio.

Dum 13a jarcento kamparanoj el la svisa kantono Wallis [Valis] forlasis sian patrion, ĉar ili sentis sin subpremitaj, kaj ekloĝis en la malgranda Walser-Valo. Ili terkulturigis la altajn regionojn, kiuj havis praarbaran aspekton kaj ĉefe servis al ĉasado. La hodiaŭa valo tiam estis en posedo de svedaj nobeluloj. Ekde 1453 ĝi apartenis al Aŭstrio. En 1805 la kontrakto de Pressburg ordonis transdonon de tuta Vorarlberg al Bavario. En 1814 ĝi denove estis akirita de Aŭstrio, sed Walser-Valo restis disigita kiel ĉiam de sia patrio: trafiko kun cetera Aŭstrio nur povis okazi trans la alta montaro.

En 1975 vivis en Mittelberg kaj ĉirkaŭo 2 976 aŭstroj, 1 310 germanoj, 486 aliaj eksterlandanoj, precipe gastlaboristoj. Se la kamparanoj de la valo diskutas inter si, oni nur malfacile povas kompreni ilian dialekton. Turismo kulpas ke la kamparanoj devas

ŝirmi sonorilojn de bovinoj, ĉar malsatantaj suvenir-ĉasistoj forŝtelis sonorilojn de la bovinaj koloj. Sed sur turismo bazas la bonfarto de la enloĝantoj. 97 procentoj de la turistoj estas germanoj. Dum aŭgusto oni registris en la valo 240 000 forluojn de litoj. En Mittelberg ekzistas diversaj amuzejoj, ankaŭ novkonstruita ludkazinoo; kompreneble oni ludas tie per germanaj markoj. Sole en unu jaro la mona cirkulado altiĝis je cent procentoj. Oni atendis por 1979 ĉirkaŭ 70 000 vizitantojn. Sed la aŭstria financministro ĝojas plej multe: Dum ĉi tiu jaro la aŭstria ŝtato ricevis de la ludkazinoo en Mittelberg proksimume 22 milionojn da ŝilingoj.

Jam de 40 jaroj oni projektas konstrui tunelon al Walser-Valo. Ankaŭ la ceteraj alpaj landoj interesiĝas pri tiu projekto, kiu realigus pli bonan interligon de Germanio al Svislando. Kion pensas la loĝantoj de la valo pri tiu projekto? "Mi konsideras ĝin tre interesa ĉar ekonomie ni povus evolui", opinias iuj. "Mi kontraŭas ĉar tunelo pligrandigas la trafran trafikon kaj poste ni ne plu havas





*Ski-cirko (maldekstre) same kiel neĝplena pejzaĝo ravas la dumvintrajn turistojn en Walser-Valo*

tian trankvilecon," diras aliaj. La plej granda parto de la gejunuloj vizitas mezan lernejon aŭ gimnazion en GFR. Poste ili studas en aŭstriaj universitatoj, ĉar tiu studado en Germanio ne estas ebla por anoj de Walser-Valo, kiuj ja estas aŭstriaj civitanoj. Demandante junulojn "ĉu vi sentas vin pli germano aŭ aŭstro?" oni ricevas ekzemple jenajn respondojn: "Nature mi estas aŭstro." "Mi estas pli aŭstro ol germano, sed ekonomie ni vivas tre bone kun Germanio. Ni ne bezonas Aŭstrion." "Se temas pri skiado, mi estas aŭstro, se temas pri futbalo,

mi estas germano..." "Elektante inter Aŭstrio aŭ Germanio: mi estas Walser-Valano!"

La 4 800 loĝantoj de Walser-Valo estas devigataj vivi ekde 1891 en speciala dogana regiono, aĉeti germanajn varojn je germanaj prezoj kaj doganigi aŭstriajn varojn.

La valanoj bone profitis el tio ĝis kiam oni enkondukis en ambaŭ landoj var-imposton, 18procentan en Aŭstrio, 13procentan en Germanio. Tio signifas ke komercistoj ricevas de Germanio nur 13 procentojn, dum ili devas pagi al la aŭstria ŝtato 18 procentojn. La

konsumantoj de Mittelberg tial jam delonge aĉetas varojn kaj nutraĵojn en proksima germana Oberstdorf por ŝpari imposton. La suferantoj estas la komercistoj de Mittelberg. Kelkaj jam fermis siajn butikojn kaj malfermis filiojn en Oberstdorf, por ne perdi siajn klientojn.

La lima kaj dogana oficejo havas nur simbolan valoron. Ĝi troviĝas en gastejo. Envojaĝantoj el Bavario estas same ne kontrolataj de doganistoj kiel elvojaĝantoj. Neniu devas montri pasporton se li venas de Bavario aŭ veturas tien. Ĉi tiuj kuriozaĵoj verŝajne estas unikaj en Eŭropo. Ni nur povas envii la Walser-Valanojn!

Franero



**Pliajn informojn petu de**

**Verkehrsamt Riezlern**  
Walserstraße 54  
D-8984 Riezlern  
A-6991 Riezlern

**Verkehrsamt Hirschegg**  
Walserstraße 71  
D-8985 Hirschegg  
A-6992 Hirschegg

**Verkehrsamt Mittelberg**  
Walserstraße 89  
D-8986 Mittelberg  
A-6993 Mittelberg



# Se vi atente legis ĉi tiun revuon

aŭ almenaŭ kun intereso trafolumis ĝin, vi sendube konstatis ke jen vi tenas unikan periodaĵon enmane. Kaj se vi nun analizas ĝin, vi probable trovas plurajn kialojn kaj motivojn subteni ĝin:

1. Vi ricevas per MONATO unuamanajn informojn, grandparte de aŭtoroj vivantaj en la landoj mem, pri kiuj ili raportas.
2. Pri fakaj temoj en MONATO verkas fakuloj — kompreneble. Sed ili tion faras ne faklingve, sed — kompreneble.
3. En MONATO ĉiu trovas ion laŭ sia gusto, ĉar ĝi estas normala revuo kun ĉiuj eroj kutimaj por tia magazino — taŭga do por ĉiuj familianoj, sed ankaŭ por kursanoj kiuj lernu ĉiutagan lingvon.
4. En MONATO ne aperas tradukoj, sed ekskluzive originale en Esperanto verkitaj artikoloj, kiujn vi do ne povas legi ie ajn aliloke.
5. Kion vi ne trovas en MONATO, estas artikoloj pri-esperantaj kaj pri-movadaj. Tial ĉi tiu magazino estas ideala legaĵo ankaŭ por tiuj homoj kiuj lernis la lingvon por utile uzi ĝin, sed ofte forlasas la movadon, ĉar movado sola ne kontentigas iliajn dezirojn kaj bezonojn.
6. Tial MONATO — ankaŭ — estas bona ilo pligrandigi la reputacion de la lingvo en ekster-movadaj rondoj: Jen revuo kiun vi senhezite, senĝene kaj senhonte povas montri al ĉiu ajn homo — kaj eble tiel konvinki lin pri la valoro de Esperanto.

MONATO do estas **la** revuo por legantoj de ĉiu aĝo, ĉiu medio, ĉiu lando!

## Kiel vi povas subteni ĉi tiun magazinon?

Unue kompreneble kiel **abonanto**. Sed sendube vi konas diversajn personojn kiuj ankaŭ abonus nian magazinon, se ili konus ĝin. Diru aŭ skribu al ili ke MONATO ekzistas, aŭ skribu iliajn **adresojn** al ni. Alia ebleco: **Donacu** abonon. Per eta monsumo vi povas regali amikon per tutjara ĝojo. Se vi donas **kurson**: Ĉu ekzistas pli taŭga ekzerc-materialo ol viaj kursanoj trovas ĝin konstante en MONATO? Ili do volonte pagos abonon. Kaj fine: Se vi opinias ke iamaniere vi povas **kunlabori** ĉe MONATO, skribu al la redakcio. Ankaŭ tiel vi subtenas nian revuon.

## Abonilon vi trovas sur paĝo 5!

### Kiel pagi?

Ni petas ĉiujn posedantojn de poŝtĉekkontoj uzi ties servojn, kiuj estas senpagaj. Niaj kontoj estas:

Eldonejo TK/STAFETO  
Bruselo n-ro 000-0422856-33  
Köln n-ro 2781 16-507  
Nederlando n-ro 4174498

Posedantoj de poŝtĉekkontoj en aliaj landoj bv. ĉiam uzi la konton en Belgujo.

Ni akceptas ĉe ojn (bankĉekoj aŭ personaj) kun la nomo de la eldonisto *Torben Kehlet* kiel ricevanto en: Usonaj dolaroj, danaj kronoj kaj anglaj pundoj sen neceso aldoni por la bankkostoj.

Francoj povas pagi rekte al la konto de la eldonisto en Parizo per interbanka transskribo (virement) al Credit Lyonnais, Compte 755.469 T, Agence 00693, Banque 30002. Ili nepre ne sendu personajn ĉekojn nek al C.L. nek al ni. Tio estus kontraŭ la reguloj de la franca nacia banko.

Abonantoj en Sudameriko bv. pagi la egalvaloron de la banka kurzo de dolaroj en brazilaj kruzejoj al *Gersi A. Bays*, Caixa Postal 49, 89800 Chapecó - SC. (ĉeko estas plej facila maniero).

Se vi ne havas eblecon sendi al ni vian kotizon en unu el la supre menciitaj manieroj, vi povas uzi internacian poŝtmandaton.

Se tio ankaŭ ne eblas, vi devas sendi bankĉekon de via lando, sed en tiu kazo bv. aldoni 10% por bankkostoj.

La abontarifo por MONATO estas por 1 jaro (11 numeroj): 800,- b.fr. aŭ egalvaloro (ekz. DM 49,50 - US\$ 26,75 d.kr. 142,- - £ 11,75 - FF 112,- - Gld. 52,50.)

Vi povas pagi por tuta aŭ por duona jaro (duona sumo).

La abonperiodo sekvas la kalendaran jaron. Se vi pagas post la komenco de abonperiodo, vi ricevos la ĝis tiam aperintajn magazinojn de la koncerna periodo.